

(EN ESPERANTO)

ISSN 0032-4361

5


1996

中國新道

EL POPOLA

ĈINIO





Turo de imperiestra palaco en mateno

Foto de **LIU SIGONG**

INTER NI

Mi ĵus ricevis la n-ron 12/95 de EPĈ. Mi legis ĝin kun plezuro, ĉar ĉinaj propraj nomoj estas skribitaj en *Pinyin* kaj en Esperanto inter krampoj.

Mi tutkore dankas alte taksatan kaj respektantan amikon Laŭlum pro "La morto de Paco". Ĝi estas vera kaj korŝira rakonto. Dankon ankaŭ al Sun Aijun pro ŝia vivoplena raporto "Ordinara samideano Ivan Ko".

ZORKA ENIZAN
(Francio)

La plej imponaj artikoloj de la decembra n-ro de 1995 estas laŭ mia privata prijuĝo "La morto de Paco" de Laŭlum, "Ordinara samideano Ivan Ko", "Esperantistinoj en NRO-Forumo", "La somera tendumo en la monto Koko" kaj "Amo de Maljunuloj".

JOSEF KONDOR
(Germanio)

Mi tre dankas tiujn, dank' al kiuj mi nun

ricevadis vian revuon. Mi tralegadis ĝin, kaj poste aliaj samklubanoj. Al ĉiuj ĝi treege plaĉis.

Dank' al Esperanto mi 2-foje vizitis vian landon, kaj precipe Pekinon. La lando estas tre interesa kaj alloga por eŭropanoj. Artikoloj en via revuo proksimiĝis al diversaj problemoj de via lando. Speciale plaĉis al mi informoj pri turismaj vidindaĵoj, ĉar ili ĉiam estas tre bone prezentitaj.

MARIA JACKOWSKA
(Pollando)

Ni adresas dankon al la supraj legantoj kaj ankaŭ al ĉiuj aliaj, kiuj skribis al ni similajn opiniojn pri nia revuo. Tio tre helpas nin elekti inter multaj temoj. Ni laŭeble aperigos artikolojn interesantajn niajn legantojn, ĉefe en la rubriko "Temo Proponita de Legantoj".

Ni esperas, ke niaj legantoj donos ideon pri la rubriko "Por Via Sano", kiu konigis tradiciajn sanigajn rimedojn de Ĉinio. Iuj legantoj jam profitis el ĝi kaj deziris daŭre legi ĝin. Ni volus scii, kiujn aliajn terapiojn ili bezonas, krom simplaj praktikaj metodoj aranĝitaj de ni.


La Red.

ENHAVO

- 2 *INTER NI*
 4 Kiel statas la homaj rajtoj en Ĉinio?
 6 Prognozo pri ĉinaj sportistoj en Atlanta
 8 Intervjuo kun prof. d-ro Lee Chong-Yeong, nova prezidanto de UEA
 10 *ĈINAJ E-ISTOJ:*
 Chen Demin kaj la Fuzhou-a E-Lernejo
 14 *VOĈO DE E-ISTOJ:*
 Vojaĝo al Interna Mongolio
 16 *ESP-NOVAĴOJ*
 17 Mi konis la landon de mia patro
 18 En jaŭ-a vilaĝo
 20 *POR KOMENCANTOJ:*
 Papilio kaj gruo
 21 *EN ĈINAJ URBETOJ:*
 Urbeto sur altebenaĵo
 24 *FACETOJ DE LA ĈINA SOCIO:*
 Kiel pasigi semajnfinojn?
 26 Baj-a Tago de Rizid-priklado
 28 *SUR NIA LIBROBRETO:*
 Ĉinio detale
 29 *LAŬ LA SILKA VOJO:*
 Xi'an hodiaŭ
 36 Revenigu kriplulojn al la vivo
 38 *TEMO PROPONITA DE LEGANTOJ:*
 Ĉinaj laboruloj transmаре
 40 Plenam amon al la filo
 42 Alilanda entrepreno en Ĉinio
 44 *ĈINA KULTURO:*
 Vizaĝornamoj de antikvaj ĉinaj virinoj
 46 *KURANTAJ AFEROJ*
 48 Suna tajrilo antaŭ 3 000 jaroj
 49 Antikva ĉina muzikaĵo retrovita en Japanio
 50 *GALERIO:*
 Jada drako
SUR LA KOVRILO:
 Gaja dancado de daur-oj
 Foto de Yu Xiangjun
 2 Turo de imperiestra palaco en mateno
SUR LA DORSKOVRILO:
[FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ]
 Printempo
 Aŭtuno

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio (p. 14)
2. Yantai (p. 42)
3. Deqen-a Tibet-nacia Aŭtonoma Subprovinco (p. 21)
4. Handan (p. 50)
5. Fufeng-gubernio (p. 49)



LA problemo pri homaj rajtoj koncernas la fundamentajn interesojn de ĉiuj loĝantoj sur nia terglobo. En Ĉinio vivas 1.2 miliardoj da loĝantoj kaj la stato de iliaj homaj rajtoj sendube estas multe atentata de la internacia socio.

Kian sintenon havas ĉinoj kontraŭ la homaj rajtoj? En 1991 la ĉina registaro publikigis blankan libron "Homaj Rajtoj en Ĉinio", en kiu ĝi montris sian konstantan starpunkton kaj praktikon koncerne la homajn rajtojn. En la libro legiĝas, kiel Ĉinio alte taksas la universalecon de la homaj rajtoj en la internacia socio, kion Ĉinio faris por subteni UN, kiu laboras por disvolvi kaj defendi la homajn rajtojn kaj la fundamentan liberecon de la homoj surbaze de sia ĉarto, kiel Ĉinio persistas en efektiviĝo de la homaj rajtoj konformaj al ĝiaj naciaj kondiĉoj kaj kiujn rimedojn ĝi alprenis tiurilate.

Por konkrete diri, Ĉinio metas la homan rajton por ekzisto kaj disvolviĝo sur la unuan lokon en la kampo de la homaj rajtoj, ĉar se plejparto de la loĝantoj de la disvolviĝantaj landoj ne havas minimumajn vivkondiĉojn, do ili povas tuŝi neniun alian enhavon de la homaj rajtoj kaj liberecon. Ĝuste pro tio, post sia fondiĝo la nova Ĉinio ĉiam prenas agrikulturon kiel bazon de disvolvo de la nacia ekonomio por likvidi malriĉecon. Dank' al longatempa penado, en 1992 la grena produktokvanto de Ĉinio atingis 442.5 miliardojn da kg kaj multe pliboniĝis la liverado de kotono, oleo, sukero, viando, ovoj, lakto k.a. kaj solviĝis la problemo de vestoj kaj manĝaĵoj por granda parto de la popolo.

Nun la konsumo nivelo de la ĉinaj urbanoj jam proksimiĝas al tiu de la bonhavaj loĝantoj, kaj en la lastaj 4 jaroj la jara pokapa enspezo por vivtena kosto en la ĉinaj urboj kreskis je 38.3%, dum

ZHANG WEN:

Kiel statas rajtoj en

tiu en la ĉina kamparo je 18.2%. En tiuj 4 jaroj 15 milionoj da loĝantoj liberigis sin el malriĉeco, kaj dank' al tio la procentaĵo de malriĉuloj en la ĉina kamparo malleviĝis de 10.1% al 8.2%. En Ĉinio la nombro de la loĝantoj kreskas ĉiujare je dekelkaj milionoj, tamen la agroj konsistigas nur 7% de tiuj de la mondo. Se oni konsideras tion, oni nature venas al la konkludo, ke en tiuj jaroj la progreso vere ne estis malgranda. Antaŭ ĉio la ĉina popolo atribuas la leviĝon de sia vivnivelo al tiu de la tuta socia disvolviĝo kaj al rapida disvolviĝo de la ĉina ekonomio. En 1991-1994 la ĉina ekonomio kreskis je 12.2% ĉiujare.

Kompreneble pro sia tro malforta ekonomia bazo Ĉinio restas disvolviĝanta lando, kvankam ĝi multe progresis. Laŭ la materialoj pri pokapa riĉaĵo publikigitaj de la Monda Banko septembre de 1995 Ĉinio okupas la 162-an lokon inter la 192 landoj kaj regionoj. Nun en Ĉinio 70 milionoj da loĝantoj ne havas sufiĉe da manĝaĵoj kaj vestoj, tial por la ĉinoj la homa rajto por ekzisto kaj disvolviĝo restas la plej grava problemo en la kategorio de la homaj rajtoj.

Koncerne la homajn rajtojn en Ĉinio, la stato de tibetanoj estas

plej atentata de la internacia publiko. En la pasinta jaro, kiam en Pekino okazis la 4-a Monda Virina Konferenco, s-ino Ciren Zhuoga, vicprezidantino de la registaro de la Tibeta Aŭtonoma Regiono, estis multe atentata. Ŝi laboris kiel vartistino, kiam ŝi aĝis nur 7 jarojn, sed ŝi nun estas altranga ŝtatoficistino. Ŝia vivo montras la ŝanĝigon de la homaj rajtoj en Tibeto. En la malnova Tibeto vivis miliono da loĝantoj, kaj la altrangaj lamaoj, registaraj oficistoj kaj aristokratoj konsistigis malpli ol 5% de la tibeta loĝantaro, kiuj tamen decidis la sorton de 95% de la tibetanoj, kiuj ĉefe estis servutuloj, komercistoj kaj metiistoj. Tiuj vastaj amasoj da servutuloj ne havis eĉ liberecon de persono, por ne paroli pri iliaj politikaj kaj demokratiaj rajtoj. En la tibeta arkivo estas letero skribita de altranga lamao al la registara ĉefo Rendi: "Por reciti vivolongigajn sutrojn por Dalai-lamao ni urĝe bezonas freŝan inteston kaj homan haŭton, du kraniojn kaj diversajn sangojn. Mi petas, ke vi sendu ilin al ni kiel eble plej baldaŭ." En tiu letero vidiĝas, kiel terure vivis la servutuloj en la malnova Tibeto.

Nur en la lasta periodo de la 50-aj jaroj, kiam Tibeto efektivi-

la homaj Ĉinio?

gis demokratian reformadon, la tibeta popolo ekĝuis ne nur ĉiujn rajtojn donitajn de la ĉinaj leĝoj same kiel la hanoj kaj aliaj naciminoritatoj, sed ankaŭ alian rajton, t.e. nacian aŭtonomecon. Ĝuste pro tio filino de malriĉulo, kia Ciren Zhuoga, povas fariĝi registara oficistino. Ŝiaj travivaĵoj montris ankaŭ la ŝanĝigon de la politika pozicio de la ĉinaj virinoj. Ŝi diris: "En la pasinteco estis neimageble, ke virinoj partoprenas en la socia politika vivo kaj en la aferoj de la registaro de Tibeto, kiu kombinas la politikan regadon kun la religiaj aferoj." Ŝi diris ankaŭ, ke nun en la Tibeta Aŭtonoma Regiono laboras 19 510 statoficistinoj, kiuj konsistigas 32.3% de la tibeta statoficistaro.

En Ĉinio estas multaj eminentaj ministrinoj, sciencistinoj kaj profesoroj, kiuj kontribuas same kiel la viroj en diversaj kampoj, sed pli grava estas ŝanĝigo de la virinoj en konceptoj. Nun ili vere fariĝis mastroj de sia sorto. En la malnova Ĉinio pro la malalta nivelo de la produktaj fortoj kaj malnova koncepto oni alte taksis la virojn kaj malalte la virinojn, kio faris virinojn dependaĵo de la viroj. Kaj koncerne la naskon, kiam kaj kiom da infanoj la virinoj nasku, tion decidis iliaj

bogepatroj kaj edzoj, kaj la virinoj estis nur naskilo. Tia fenomeno nun preskaŭ malaperis. Laŭ enketo de koncernaj departementoj, en la urboj kaj kamparo multaj edzinoj povas mem decidi la problemon de nasko kaj pli multaj geedzoj tion decidas kune, sed nur tre malmultaj edzinoj obeas la arbitran decidon de la bogepatroj. Tiu ŝanĝigo estas manifestiĝo de alia fundamenta homa rajto, kiun la virinoj akiris, post kiam ili akiris la sendependecon pri geedziĝo. Kaj tio estas strikte ligita kun multaj faktoroj: kigrade la virinoj partoprenas en la soci-ekonomia aktivado, kigrade ili estas klerigitaj kaj kigrade ili okupiĝas pri laboro. Jen kelkaj ciferoj: En 1994 la ĉinaj laboristinoj kaj oficistinoj konsistigis 44% de la totala nombro de la ĉinaj salajruloj, kaj 97.7% de la 7-11-jaraj knabinoj vizitis lernejon, kaj en 1993 95% de la ĉinaj virinoj partoprenis en balotado en la lokaj popolaj kongresoj.

Decembre de 1995 la ĉina registaro publikigis blankan libron "La Progreso de Homaj Rajtoj en Ĉinio", kiu montris per faktoj la evidentan pliboniĝon de la homaj rajtoj en Ĉinio. Tiu pliboniĝo manifestiĝis ne nur en la homa rajto por ekzisto kaj disvolvigo,

sed ankaŭ en la politikaj, sociaj kaj kulturaj aferoj. La blanka libro dediĉis paĝojn al konigo de la civilaj kaj politikaj rajtoj de la ĉina popolo. S-ro Zhu Muzhi (Ĝu Muĝi), prezidanto de la Ĉina Instituto pri Homaj Rajtoj, komentis: "La kerno de la politikaj rajtoj estas demokratio, sed kio estas demokratio? Mi opinias, ke ĝi estas tio, ke la socio kaj ŝtato faras ĉion laŭ la deziroj de plejparto de sia popolo. Nun la ĉina socio estas stabila politike, progresanta ekonomie kaj la popolo vivas en paco. Ĉio ĉi rezultas el la fakto, ke la ĉina registaro agas laŭ la volo kaj interesoj de sia popolo, kaj la popolo strikte unuiĝas kaj unuanime laboras por potenciĝo de sia nacio..."

La blanka libro montris alian vidpunkton de Ĉinio, t.e. la stato de la homaj rajtoj de ĉiuj landoj estas limigita de la socia evoluo kaj pliboniĝas kun la socia disvolvigo kaj profundiĝo de koncepto pri homaj rajtoj. La libro konfesis, ke kvankam Ĉinio atingis sukcesojn en akcelo de la homaj rajtoj, tamen ĝi havas ankaŭ mankon ĉi-rilate, ekz. kvankam la ĉina ekonomio rapide disvolviĝas, la popola vivo rimarkinde pliboniĝas, tamen ekzistas granda distanco en la ekonomia disvolvigo inter Ĉinio kaj evoluantaj okcidentaj landoj. La ekonomia malekvilibro ekzistas ankaŭ inter la orienta marborda regiono de Ĉinio kaj ĝiaj meza kaj okcidenta regionoj. La 70 milionoj da loĝantoj, kiuj daŭre suferas de malsufiĉo de manĝaĵoj kaj vestoj, plejparte vivas en montregionoj de meza kaj okcidenta Ĉinio, en ĝiaj dezertaj regionoj kaj en ĝiaj regionoj facile atakataj de endemioj. Por helpi la loĝantojn de tiuj regionoj kiel eble plej baldaŭ sin liberigi el malriĉeco, por ke la jam bonhavigintaj loĝantoj vivu pli bone kaj por ke la ĉina popolo plene ĝuu la homajn rajtojn, multaj aferoj estas farendaj por la ĉina registaro. ■

Prognozo pri ĉinaj sportistoj en Atlanta

DUM la pasinta vintro ĉinaj sportistoj streĉe sin ekzercis por la 26-aj Olimpikoj en Atlanta.

Ĝis la fino de 1995 pli ol 180 ĉinaj sportistoj de 16 sportobranĉoj kaj 12 pilkoludaj teamoj gajnis la kvalifikon por la 26-aj Olimpikoj. Inter ili la Ĉina Virina Softpilka Teamo la unua gajnis la kvalifikon. Ĝin gajnis ankaŭ la Ĉinaj Vira kaj Virina Korbopilka Teamoj, Ĉinaj Vira kaj Virina Gimnastikaj Teamoj, Ĉina Halterleva Teamo, Ĉina Virina Piedpilka Teamo, Ĉina Virina Flugpilka Teamo kaj Ĉina Virina Manpilka Teamo.

Estis tre malfacile gajni la kvalifikon por la Ĉina Virina Flugpilka Teamo, gvidata de la iama eminenta flugpilkistino Lang Ping, . Tio montris, ke la teamo liberigis sin el la negativa influo kaŭzita de alternigo de novaj kaj malnovaj sportistinoj. Tamen ĉeftrejnistino Lang Ping kaj ŝiaj kolegoj opinias, ke ĝi, organizita antaŭ nur 10 monatoj, ankoraŭ ne maturiĝis teknike, taktike kaj psike, nek estas sperta en konkurso. Malgraŭ tio, la ĉeftrejnistino estis severa al siaj teamanoj. Foje, en trejnado ŝi seninterrompe ĵetis pilkon al sportistino tiel rapide, ke ĉi tiu laciĝis ĝis larmoj ĉe la finiĝo. Lang Ping bone sciis, ke dank' al severa trejnado la Ĉina Virina Flugpilka Teamo kvinfoje gajnis mondan ĉampionecon. Nun la ĉinaj flugpilkistinoj plene energie sin ekzercas por atingi kontentigan sukceson en Atlanta.

Kompare kun la Ĉina Virina Flugpilka Teamo, la Ĉinaj Vira kaj Virina Gimnastikaj Teamoj estas iom pli fortaj. En la Monda Gimnastika Ĉampioneca Konkurso en 1995 ili gajnis la teamajn ĉampionecon kaj subĉampionecon respektive. S-ro Gao Jian (Gaŭ Ĝjan), ĉeftrejnistino de la teamoj, diris, ke tio ŝuldis peneman trejniĝon de la sportistoj. Post dismembrigo de Sovetunio en la mondo estas nur 2-3 teamoj, kiuj povas rivali kun la ĉinaj gimnastoj en la vira kunmetita teama konkurso. En la kunmetitaj individuaj konkursoj gimnasto Li Xiao-

shuang (Li Ŝjaŭŝuang) kaj gimnastino Mo Huilan rivalos kun ĉ. 10 fortaj alilandaj gegimnastoj, tamen eblos al ili gajni oran medalon. En la unuopaj konkursoj ĉiu ĉina sportist(in)o rivalos kun ĉ. 15 alilandaj gimnastoj. La ĉinaj gimnastoj estas fortaj en la konkurso de rekado, paralelado kaj libera gimnastiko dum la gimnastinoj en ŝtupa paralelado kaj trabado.

Post la komenco de vintro, 1995, la ĉinaj gegimnastoj trejniĝis de duono post la sesa ĝis la 19-a ĉiutage per difinitaj kaj malfacilaj movoj. S-ro Gao Jian elmetis la sloganon "Por ĉiu plia 0.1 poento!" Laŭ li, se ĉiu gajnos plian 0.1 poenton en ĉiu sia disciplino, absolute ne estos revo gajni la ĉampionecon en la kunmetita teama konkurso.

La kvalifiko por atletiko, plonĝo kaj naĝo estas gajnita per sukceso en internaciaj kaj landaj konkursoj sankciitaj de la internaciaj federacioj de koncernaj sportobranĉoj. Nun la nombro de ĉinaj sportistoj, kiuj sukcesis en la koncernaj konkursoj de la supre menciitaj sportobranĉoj, multe superis tiun difinitan. Kiuj partoprenos en la 26-aj Olimpikoj, tio estos decidita de ilia sukceso en konkursoj antaŭ la Olimpikoj.

Ĉinaj atletoj estas certagrade fortaj en la vira kaj

Wang Junxia (la antaŭa) en kurado




virina marŝado, virinaj mezlong- kaj longdistancaj kuroj kaj virina globoĵeto. Tamen, ili ne havas solidan certecon por gajni medalojn en Atlanta.

En la monda ĉampioneca konkurso de Stutgarto en 1993 ĉinaj kuristinoj gajnis ĉiujn orajn medalojn de la sportbranĉo de mezlong- kaj longdistancaj kuroj. Kaj en la monda ĉampioneca konkurso de Göteborg en 1995 ili gajnis neniun oran medalon. Neeblas al ili havi la plej bonan staton de atletiko en la mallonga tempo. Sed, de januaro ĉi-jare el la 115 atletoj partoprenantaj en trejnado por gajni la kvalifikon por la 26-aj Olimpikoj la mezlong- kaj longdistancaj kuristinoj denove fariĝis fokuso de atento. Dum la vintra trejnado la monda longdistanca-kura ĉampionino Wang Junxia (Ŭang Ĝjunŝja) ellitiĝis je duono post la kvara ĉiumatene. Post ellitiĝo ŝi kuris 20 km laŭ montvojo. Tiamaniere ŝi retrovis sian fizikan forton kaj metis al si firman bazon por gajni la ĉampionecon en Atlanta.

La Ĉina Plonĝista Teamo multfoje atingis bonan sukceson en gravaj internaciaj konkursoj, tamen s-ro Xu Yiming (Ŝju Jiming), trejnisto de la teamo opiniis, ke ne estos facile por ĝi gajni orajn medalojn en la olimpikoj. Li diris, ke por gajni ĉampionecon la plonĝistoj devas plej bone fari ĉiun movon kaj superi siajn rivalojn per 70-80 poentoj en la konkurso. Pasintjare la Internacia Naĝa Federacio ŝanĝis la konkursan sistemon kaj difinis, ke la prepar-konkurso, kvaron-finalo kaj finalo estu farataj en unu tago anstataŭ en du tagoj. Sekve, la Ĉina Plonĝista Teamo alprenis laŭ la nova sistemo trejnad-rimedojn nuligi sieston de plonĝistoj, meti trejnadon de fizika forto sur la unuan lokon. Iuj spertaj trejnistoj kaj pliaĝaj plonĝistoj analizis la malfortecon de ĉinaj sportistoj en trampolino kaj donis opiniojn pri intensigo de trejnado por ĝi.


Laŭ difino de la Internacia Olimpika Komitato oni listigas lokojn de tablotenisistoj, volanistoj kaj tenisistoj laŭ ties akumulitaj poentoj en internaciaj konkursoj. La gajnintoj de la unuaj lokoj estas kvalifikitaj al olimpikoj. Laŭ la difino ne estas problemo por iuj ĉinaj teblotenisistoj kaj volanistoj partopreni la olimpikojn. Ĉinaj tablotenisistoj Wang Tao kaj Kong Linghui kaj ĉinaj tablotenisistinoj Deng Yaping kaj Qiao Hong (Ĉjaŭ Hong), kiuj okupis la unuajn du lokojn respektive en la mondo surbaze de siaj akumulitaj poentoj en internaciaj konkursoj en 1995, estas rajtigitaj partopreni en la 26-aj Olimpikoj, sen bezono partopreni en kvalifika konkurso. Analizante la situacion de la Ĉina Tablotenisa Teamo en la olimpikoj, s-ro Zhang Xielin (Ĝang Ŝjelin), iama ĉeftrejnisto de la Ĉina Virina Tablotenisa Teamo, diris, ke la plej granda danĝero, kiun alfrontas la Ĉina Virina Tab-



Samtempa virina turplonĝo

lotenisa Teamo, estas “transmara korpuso”, t.e., ĉinaj teblotenisistinoj, kiuj nun ludas en aliaj landoj kiel ties sportistinoj. El la unuaj 50 tablotenisistinoj de la mondo estas 12 ĉinaj kaj 14 korpusaj. Nun 10 el la “transmara korpuso” gajnis la kvalifikon por la 26-aj Olimpikoj. Kelkaj el ili estis membroj de la Ĉina Tablotenisa Teamo kaj bone scias la ludarton kaj malfortojn de ĉinaj sportistinoj. En la fermita trejnado komencita de la unuaj tagoj de 1996 ĉiuj tablotenisistoj, inkluzive de la ĉefaj, peneme trejniĝis. Ĉiutage monda ĉampionino Deng Yaping forlasis la trejnejon la lasta. Ŝi diris: “Mi devas multe pli peneme trejniĝi ol iam antaŭe, ĉar nun en la mondo ĉ. 10 tablotenisistinoj havas la kapablon rivali kun mi, sed antaŭe nur 1-2.” Ĉiuj sportistoj de la Ĉina Vira Tablotenisa Teamo ege deziras partopreni en la olimpikoj. Kiuj gajnos la kvalifikon, tio estos decidita de ilia trejniĝo.

La Ĉina Basbala Teamo, Ĉina Vira Manpilka Teamo, Ĉina Vira Hokea Teamo kaj Ĉina Rajdarta Teamo jam perdis la kvalifikon. Kia do estos la perspektivo de Ĉinio en la 26-aj Olimpikoj laŭ la jam gajnitaj kvalifikoj? Menciante tion, s-ro Wu Shaozu, estro de la Fizikkultura kaj Sporta Komisiono de la Ĉina Popola Respubliko, diris, ke Ĉinio daŭre tenos sian lokon en la “dua bloko”. Por diri konkrete, en la 25-aj Olimpikoj Usono, Rusio kaj Germanio okupis la unuajn tri lokojn respektive kaj estis rigardataj kiel la “unua bloko”. Videble, ili restos senŝanĝaj en lokoj de la 26-aj Olimpikoj. En la 25-aj Olimpikoj Ĉinio gajnis 16 orajn medalojn kaj per tio okupis la kvaran lokon inter la gajnintoj de oraj medaloj. Germanio, kiu gajnis 34 orajn medalojn, okupis la trian lokon. Ĉinio estis enlistigita kiel membro de la “dua bloko”. La diferenco de oraj medaloj inter la landoj, kiuj okupis la kvaran, kvinan kaj sesan lokojn en la 25-aj, estis nur 1-2. Ajna fuŝo kaŭzos ŝanĝigon de lokoj. Ŝajne, la celo teni la lokon en la “dua bloko” ne estos facile atingebla por la ĉinaj sportistoj en la 26-aj Olimpikoj. ■



Intervjuo kun prof. d-ro Lee Chong-Yeong, nova prezidanto de UEA



Prof. d-ro Lee Chong-Yeong (meze), s-ino Tan Xiuzhu, vicĉefredaktorino de EPC, kaj s-ro Dai Song'en, vicĉefredaktoro de EPC

DUM la 80-a UK en Tampere elektigis nova estraro de UEA. Prof. d-ro Lee Chong-Yeong el Koreio estis elektita kiel prezidanto de UEA. Li estas la dua prezidanto de UEA el Azio post japano Hideo Yagi antaŭ 35 jaroj. Pro tio mi kaj miaj kolegoj de la redakcio de EPC varme gratulis lin. Ni kaj raportistino de la Esperanta Sekcio de la

Ĉina Radio Internacia faris al li kelkajn demandojn.

Demando: Dum la Tamperea Kongreso elektigis nova estraro de UEA kaj vi estis elektita kiel ĝia prezidanto. Ĉu vi antaŭvidis tion? Kion vi opinias pri via prezidantiĝo?

Respondo: Mi ne antaŭvidis tion antaŭ unu jaro. Mi aŭdis pri la ebleco de mia kandidateco por

prezidanto de UEA en januaro de 1995. Tiam s-ro Harmon, kunordiganto de elekto-komisiono, sugestis, ke mi estu kandidato por prezidanto de UEA, kaj petis mian konsenton por tio.

Mi opinias, ke ĉiun honoron akompanas devo. Pro tio mi pensas, ke fariĝi prezidanto de UEA estas honoro kaj samtempe granda laboro kaj devo. Mi esperas, ke mi iamaniere plenumos mian devon.

Demando: Ĉu vi iom informiĝis pri komentoj kaj opinioj pri via elektiĝo?

Respondo: Jes, multaj eŭropaj esperantistoj diris al mi, ke nun Esperanto estas vere monda lingvo, ĉar antaŭe Esperanto ŝajnis nur eŭropa lingvo kaj eŭropa movado, sed nun ĝi fariĝis la monda.

Demando: Kian rolon ludas la prezidanto de UEA kaj kio estas gravaj taskoj por Esperantujo?

Respondo: Lia rolo estas kunordigi la agadon de UEA-estraranoj kaj helpi realigi la aspiron de Esperantujo, kies gravaj taskoj estas eduki junajn esperantistojn kaj atentigi la ne-Esperantan mondon, speciale internaciajn organizojn, ke praktike eblas uzi Esperanton por internacia komunikado kaj paco, ĉar Esperanto ne estas hobia de E-parolantoj, sed serioza kaj laŭdinda movado de pacamo kaj homamo.

Demando: Kiel nova prezidanto de UEA, kian opinion vi havas pri la nuna E-movado en la mondo?

Respondo: Kiel vi scias, E-movado en Eŭropo estas forta kaj havas longan historion. Kaj E-movado en Azio estas relative malforta. Sed E-movado en Ĉinio, mi pensas, estas tre bona kaj modela, modela eĉ por la tuta mondo. Ankaŭ la japana E-movado iras tre bone kaj havas longan historion. Kaj mi pensas, ke ankaŭ la azia movado povas esti granda ero aŭ elemento de E-movado tutmonde. La afrika movado estas tre juna kaj iomete malforta, sed ni jam vidas ĝian bonan komencon. Tiel UEA subtenas la afrikan movadon per fondaĵo aŭ subvencio de pago de kotizo de UEA-membreco ktp.

Demando: Kaj kiamaniere vi planas vigligi la movadon en Afriko?

Respondo: Ni havas unu estraron, kiu respondecas speciale pri la afrika E-movado. Li trairis kelkajn afrikajn landojn por helpi ilin, ekz. li faris viziton al Togolando, kaj la tiea E-movado disvolviĝis. Kaj la Togolanda E-Asocio fariĝis membro de UEA. Mi pensas,

ke la E-movado en Afriko pli kaj pli disvolviĝos. Sed la problemoj kuŝas en tio, ke afrikanoj ne povas pagi la kotizon nek eldoni librojn ktp. Pasintjare ni subvenciiis 2 afrikajn landojn por eldoni lernolibrojn por ili mem kaj pagis membroklotizojn por afrikanoj.

Demando: Kiel vi solvos la problemon, ke al Esperantujo mankas junuloj?

Respondo: Tio ĉi estas problemoj ĉefe en eŭropaj landoj. Mi opinias, ke sen freŝa sango neniu organizo povas vivi, do ni devas havi novan sangon. Edukado de junaj esperantistoj estas tre grava afero, kaj ni devas dediĉi nian klopodon aparte por eduki gejunulojn en eŭropaj landoj. Ekz., TEJO devas ludi gravan rolon kaj UEA devas subteni la aktivadon de TEJO kaj ankaŭ landajn E-kursojn aparte por gejunuloj.

Mi opinias, ke esperantistoj en Koreio, en Japanio kaj eĉ en Ĉinio estas pli junaj ol tiuj en eŭropaj landoj. De nun mi devas multe atenti junulajn aferojn. Mi ĉeestis E-kunvenojn de multaj landoj kaj trovis, ke en multaj E-grupoj, precipe en tiuj de Ĉinio, oni parolis nur pri Esperanto, sed ne en Esperanto. Kaj en lokaj kunvenoj ni devas klopodi por paroli en Esperanto, sed ne nur pri Esperanto. Pro tio lokaj E-kunvenoj devas havi alilandajn esperantistojn, almenaŭ unu alilandan esperantiston, por devigite paroli en Esperanto. Pro tio la Korea E-kunveno invitas al si alilandajn esperantistojn.

Demando: Kian impreson vi havas pri la ĉina E-movado?

Respondo: La ĉina E-movado estas unu modelo de E-movado, ne nur en Azio, sed ankaŭ en la tuta mondo. Vi havas la Esperantan Sekcion de la Ĉina Radio Internacia, unu el la plej grandaj radioj en la mondo, kaj la revuon EPĈ, kiu multe kontribuas ne nur al Ĉinio, sed ankaŭ al la tuta Esperantujo en la mondo. Mi esperas, ke via registaro kontinue subtenos la laboron de la Esperanta Sekcio de la Ĉina Radio Internacia kaj tiun de la re-

dakcio de EPĈ.

Demando: Ĉu vi volus paroli iomete pri vi mem, pri via profesio kaj pri via Esperanta kariero?

Respondo: Mi naskiĝis en 1932, doktoriĝis pri komerca administrado. Nun mi estas profesoro kaj dekano de Post-diploma Lernejo de Komerca Administrado de Kyungpook Nacia Universitato en Koreio. Post studado en universitatoj de Yeungnam en Koreio, Hawaii kaj Harvard en Usono, mi laboris dum 17 jaroj por UN kaj retiriĝis en 1987 kiel ĉefo de Merkatuma Grupo de la Organizo.

En 1948, kiam mi estis studento, mi memlernis Esperanton pere de lernolibro kaj poste en 1954 mi plu lernis de profesoro Hong, unu el la koreaj pioniroj. Dum 1958-1962 mi estis sekretario de Korea E-Instituto; ekde 1988 mi laboris kiel vicprezidanto de Korea E-Asocio kaj de 1994 kiel ĝia prezidanto. Mi estas komitatano A en UEA ekde 1989. En la Loka Kongresa Komitato de la Seula UK mi funkciis kiel ĝenerala sekretario.

Demando: Kian opinion vi havas pri la lingva problemoj en la mondo?

Respondo: Same kiel homa rajto, ekzistas ankaŭ lingva rajto. UN faris multajn laborojn en la kampo de homaj rajtoj por malfortaj homoj, sed UN ne faris multe por la lingva rajto de lingve malfortaj nacioj. Mi opinias, ke UN devas fari pli da laboroj por plifortigi lingvan rajton por lingve malfortaj nacioj.

Ni havas bazan principon de Esperanto, ke ĉiu nacio havas 2 lingvojn: sia propra nacia lingvo kaj Esperanto. Ni devas uzi Esperanton kiel ponton por komunikiĝi kun aliaj popoloj. Lingve malfortaj nacioj devas defendi sian lingvon kontraŭ lingvo-imperiismo. Esperanto estas ŝildo por defendi la malfortajn lingvojn kontraŭ lingvo-imperiismo. Oni devas havi pontan lingvon inter la lingvoj. Ĝi estas la internacia lingvo Esperanto. ■



Chen Demin kaj la Fuzhou-a E-lernejo

Teksto de SUN AIJUN
Fotoj de LIU SIGONG

PRENINTE vermiĉelojn preparitajn speciale por ni, ni devis adiaŭi la Fuzhou (Fuĝoŭ)-an E-Lernejon (FEL). Mi pririgardis por la lasta fojo tiun malgrandan oficejon de la lernejo, kie bonorde staras multaj tabloj kaj ŝrankoj. Kiam mi vidis la verdan stelon alte pendantan meze de la muro, naskiĝis en mi ĉagreno, ĉar mi ne volis forlasi tiun amoplenan junularan familion kaj tiujn ridetantajn vizaĝojn konatajn de antaŭ kelkaj tagoj.

GRANDA ATINGO

Antaŭvespere de la Novjara Tago de 1996 FEL festis sian 10-jariĝon en la Fuzhou-a Scienc-teknika Domo de Fujian (Fuĝjan)-

provinco ĉe la sudorienta marbordo de Ĉinio. La salutvortoj en Esperanto donitaj de infanoj sur la podio vekis de tempo al tempo varmajn aplaŭdojn de la ĉeestantoj. Kun vizaĝo iom laca kaj pala, Chen Demin, estro de FEL, sidis en nerimarkinda loko inter la spektantoj. Li multe klopodis por prepari tiun festadon. Dum tiuj 10 jaroj Chen Demin prenis la lernejon kiel sian hejmon kaj energie laboris.

En la lernejo la gejunuloj karese nomas la 32-jaran Chen Demin Lao De (maljuna De) pro lia kompetenteco, por esprimi al li respekton kaj konfidon. Li, neparolema, en okulvitroj, aspektas malforta.

10 jarojn antaŭe, la 22-jara Chen Demin starigis la Taijiang-

(Tajĝjang)-an E-Lernejon de Fuzhou (nun FEL) kun nur unu tablo kaj unu ŝranko. En prunteprenita klasĉambro de iu elementa lernejo, Chen Demin respondecis ne nur pri mastrumaj aferoj de sia E-Lernejo, sed ankaŭ pri E-instruado al 120 pli-malpli samagaj lernantoj en 2 klasoj. 10 jarojn poste, en la lernejo laboras 87 instruistoj kaj administrantoj, funkcias kursoj pri 12 lingvoj, infan-dukado, sekretariado, komputera tajpado kaj kontado. Chen Demin laboras nun kiel estro de FEL, kies kapitalo kreskis de 300 janoj al 2 milionoj. Dum tiuj 10 jaroj 26 000 personoj diplomigis el la lernejo. Plurfoje FEL estis honorita kiel avangarda plenkreskula lernejo kaj unuaklasa kolektiva lernejo de Fuzhou.

PRAKTIKA SPERTO

“Post kelkara praktikado mi komprenis, ke FEL povas bone funkcii dank’ al la unuanimeco de la estraro, ĝia kolektiva saĝo, ĝia sinoferemo, t.e. la spirito de Esperanto,” Chen Demin diris al mi je mia demando pri lia administrado de la lernejo.

Kiel ĉefa respondeculo de la lernejo, Chen Demin venis en la lernejon je la 7-a kaj duono ĉi-matene, tagmanĝis kune kun siaj kolegoj en la lernejo kaj forlasis ĝin je la 22-a post la vesperaj kursoj. En ferioj li ofte gvidis siajn kolegojn senpage labori en la lernejo: ripari klasĉambrojn, fari pupitrojn aŭ ludilojn por infanoj.

La lernejo havas kompletan da rigoraj administraj reguloj. Tio garantiis la instruon kvaliton, bonajn disciplinitecon kaj atmosferon de la lernejo. Ĉiujare la lernejo sendis 6-8 laborantojn trejniĝi en alia loko kaj okazigis someran tendumon por la laborantoj. La lernejo ofte organizis prezentadon de programeroj kaj festis la naskiĝtagon de la laborantoj. Ĉio tio ja estas nemankigebla por vigligi la vivon.

“Ĉiuj diris, ke mi estas malforta. Sed kiam mi malsukcesis en la ekzamenoj por eniri en altlernejon, diplomiginte el supera mezlernejo, mi laboris kiel transportisto kaj ĉarpentisto. Mi neniam timis penigan laboron,” diris Chen Demin. Mi estis informita, ke por la laboro de FEL li ne nur multe klopodis, sed ankaŭ kuraĝe batalis kontraŭ ĉio, kio malhelpas la disvolviĝon de FEL. En la unuaj jaroj post la stariĝo de FEL, iuj kalumniis lin kiel malversaciulon. Post enketo la supera instanco deklaris lin senkulpa. Aliaj misakuzis, ke la lernejo postulis tro altan kotizon. Per leĝo oni finfine punis tiujn kalumniantojn.

LASTAJ DU E-LECIONOJ EN 1995


Je la 19-a de la 28-a de decembro 1995, brile lumis lampoj en iu klasĉambro de FEL. Mi kune kun

pli ol 20 gejunuloj voĉlegis tekston, sekvante instruiston Jiang Yunlin (Ĝjang Junlin), kiu estas prezidanto de la Fuzhou-a E-Asocio. Li senpage instruis Esperanton en FEL 2-foje ĉiusemajne. Menciante la gejunulojn de la lernejo, li emocie diris: “Ili vere estas mia ekzemplo. En la periodo, kiam ekonomio rapide disvolviĝas, oni pli kaj pli bezonas fremdajn lingvojn, FEL ne fermis sin en rutino. Ĝi funkciigis ankaŭ la anglan, japanan kaj alilingvajn kursojn. En ĝi aldoniĝis ankaŭ kursoj de edukado infana kaj profesia. Estas laŭdinde, ke FEL portas ankoraŭ sian Esperantan nomon, alte tenante verdstelan standardon de Esperanto. Dum

kato, farante gestojn ĉe la buŝo por montri kvazaŭ longajn lipharojn de la kato kaj imitante ĝian blekon. “Kiel diri en Esperanto?” ŝi daŭrigis sian demandon. Post momenta hezito ili unuvoĉe respondis: “Kato.”

Ŝi ĝoje ridetis. Post Chen Demin, ŝi estas la dua, kiu longe servis en la lernejo. Kiel unu el la unuaj lernantoj de FEL en 1986, ŝi restis en FEL kaj fariĝis kompetenta helpanto de Chen Demin. Nun ŝi laboras kiel estro de la lerneja oficejo kaj direktoro de la infanĝardeno “Verda Ĝermo”.

“Nia infanĝardeno stariĝis en 1989,” ŝi diris al mi. “Tiam mi kaj aliaj junulinoj ne havis sper-




En E-kurso por infanoj

tiuj 10 jaroj FEL kulturis ĉ. 3 000 E-lernantojn, faris multajn laborojn por propagandi Esperanton kaj provis E-kurson en infanĝardeno.


Je la 10-a de la sekvanta tago pli ol 30 ĉ. kvinjaraj infanoj bonorde sidis en 5 vicoj en klasĉambro de la infanĝardeno “Verda Ĝermo”, abunda je koloraj papertondaĵoj pri bestoj. Instruistino Chen Ping staris antaŭ la infanoj, tenante en la manoj koloran bildon de ĉarma kato. Ŝi demandis la infanojn: “Kio ĝi estas?” La infanoj respondis en la ĉina lingvo, ke ĝi estas

ton. Kiam infanoj ploris, ni sciis nur brakumi ilin por ilin kvietigi. Tio estis laciga. Nun vivas ĉ. 300 infanoj en la ĝardeno kaj la pensiona lernejo ‘Verda Burgono’ nove konstruita. Tie laboras pli ol 20 diligentaj kaj kapablaj junulinoj finintaj la kurson de infan-edukado. Ni provinstruas fremdan lingvon al la infanoj, tion laŭdas iliaj gepatroj.”

Du trionoj de la laborantoj de la lernejo estas esperantistoj. Ili unu-anime laboras sub la verdstela standardo por pli bela perspektivo de FEL. ■




S-ro Chen Demin kaj lia E-instruisto Wu Qingnan (dekstre)



Esperanta leciono






S-ro Chen Demin (dekstre), s-ro Zou Guo-xiang (meze), ĝenerala sekretario de la Ĉina Esperanto-Ligo, kaj s-ano Liu Bingjun



S-ro Chen Demin (la kvina de maldekstre) kaj liaj kolegoj

Vojaĝo al Interna Mongolio

de ZORKA ENIZAN (Francio)



S-ino Zorka Enizan prelegas en la Universitato de Interna Mongolio.



S-ino Zorka Enizan kaj s-ro Ni Dongyang antaŭ la maŭzoleo de Ĝingis-Ĥano

DE la 20-a ĝis la 27-a de aŭgusto 1995, mi havis la plej belan travivaĵon de mia vivo: Jam de pluraj jaroj mi revis pri vizito de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio de Ĉinio. Finfine mia revo realiĝis dank' al sinjoro Li Sen, prezidanto de la Esperanto-Asocio de Interna Mongolio kaj tieaj sindonemaj kaj bonkoraj gesamideanoj. S-ro Ni Dongyang, membro de EPC en Pekino, volis akompani kaj helpi min dum tiu vojaĝo. Ni do ĝuis la samajn honorojn kaj plezurojn ĉie.

Dum nia restado en Hohhot, la ĉefurbo de la regiono, ni ne nur ĝuis la bonvenigan kunsidon de esperantistoj en varma kaj Esperanta etoso, sed ankaŭ vizitis kelkajn vidindaĵojn, kiaj Zhaojun (Ĝaŭĝjun)-tombo kaj Zhaohe (Ĝaŭhe)-herbejo. Pri Zhaojun oni prezentis interesan antikvan rakonton. Ŝi estis belulino de la Okcidenta Han-dinastio kaj elektita kiel palaca knabino de imperiestro Yuan. La imperiestro petis pentriston desegni la vizaĝon de belaj palacaj knabinoj, sed Zhaojun ne subaĉetis la pentriston, do li pentris ŝin malbela. Kiam la estro de la hunoj volis hanan knabinon, ŝi memvole edziniĝis al li, por ke la du nacioj havu bonajn rilatojn. Nur tiam la imperiestro rimarkis ŝin tre bela. La posteuloj konstruis tiun tom-

bon je 33 metroj altan por memori ŝian pacaman ideon.

La plej interesa estas vizito de Zhohe(Xilamuren)-herbejo. Tie ni ĝuis neforgeseblajn belegajn kaj vastajn pejzaĝojn de la stepo, ĉevalrajdadon, loĝadon en jurtoj, bongustajn mongolajn specialaĵojn. Kiam ni ekmanĝis en jurto, belaj mongolaj junulinoj prezentis agrablajn kantojn kun glaso da vino en la manoj por esprimi al ni bonvenigon kaj ni de-

kaŝmiro.

Post kvartaga vizitado en Hohhot ni veturis per trajno al la urbo Baotou, ŝtal-industria centro de la regiono. Tie troviĝas la maŭzoleo de Ĝingis-Ĥano sur Ordos-altebenaĵo ĉ. 200 kilometrojn okcidente de la urbo. Ĝingis-Ĥano nomata Temuĝin estis fondinto de la Mongola Imperio, militisto kaj politikisto. Li unuigis diversajn tribojn de mongoloj en la fino de la 12-a jarcento.

jaroj oriente de la urbo. Wudang signifas en la mongola lingvo "saliko", ĉar ĝi situas en salikovalo. Survoje ni scivoleme rigardis la plej malnovan parton de la Granda Muro konstruitan de Zhao(Ĝaŭ)-regno dum la periodo de Militantaj Regnoj (475-221 a. K.).

La 27-an de aŭgusto dum nia reveno al Pekino, la vetero estis tiel suna kaj hela, ke ni klare vidis el la aviadilo la sunumitan Grandan Muron, kvazaŭ ĝi ankaŭ volus manifesti la ĝojon pro nia frateca vizito de la Interna Mongolio.

Ni travivis multajn ekzotikajn kaj kortuŝajn momentojn dum la vizitado, la mongolaj kulturo kaj moroj donis al ni profundan impreson. Nia ĉi-foja vojaĝo vere estas neforgesebla. Ni tutkore dankas s-ron Li Sen, liajn gefamilianojn kaj s-ron Xiao Ke (Ŝjaŭ Ke), kiu akompanis nin surloke. Ili donis al ni ĉiam afablecon por niaj loĝado, manĝo kaj vizitado. Menciinda estas ĉarma 7-jara filineto de s-ro Xiao. Ŝi prezentis por ni belegajn dancojn kaj kantojn dum nia vizitado kaj ludis pianon en la hejmo. Ni dankas ankaŭ ĉiujn aliajn samideanojn kaj membrojn de la Esperanto-Asocio de Interna Mongolio.

Mi scias, ke ne sufiĉas ilin danki, kaj estas prefere ilin imiti. Mi tutkore deziras, ke la francaj esperantistoj, precipe E-fervojistoj, organizu vojaĝon al Interna Mongolio. Mi estas preta ilin helpi kaj ankaŭ akompani, ĉar en tiu regiono vere estas multaj vidindaj lokoj. ■



S-ino Zorka Enizan (la tria de dekstre en la antaŭa vico) kaj membroj de la Esperanto-Asocio de Interna Mongolio

vis unufoje eltrinki la vinon por esprimi nian respekton. Ni ankaŭ surmetis mongolajn vestojn por nin foti.

Nin varme akceptis ankaŭ fame konata filologo kaj verkisto s-ano Wu Chizhe (U Ĉiĝe) kaj aliaj profesoroj de la Universitato de Interna Mongolio. Mi kaj s-ro Li Sen aktive diskonigis Esperanton al studentoj en la universitato kaj tiel vekis ĉe ili intereson pri la lingvo, ke iuj el ili jam esprimis volon lerni ĝin.

Interna Mongolio karakteriziĝas per vastaj stepoj kaj famas pro paŝtado de ŝafoj, kaproj kaj bovoj, tial ni nature vizitis lanŝpinejon, kie oni produktas tre bonkvalitajn lanaĵojn kaj vestaĵojn. Ni ĝoje aĉetis en favora prezo diverskolorajn koltukojn kiel

to kaj en la komenco de la 13-a jarcento. En la jaro 1206 li estis titolita Ĝingis-Ĥano, kiu signifas en la mongola lingvo "maro aŭ potenco". Post la fondiĝo de Yuan-dinastio oni titolis lin Yuantaizu (praavo de Yuan-dinastio) post lia morto.

Sur revena vojo ni grimpis Xiangshawan (Ŝjangŝavan) (kreko kun sonora sablo). Kiam ni malsupren glitadis sur la sablo, ni povis aŭdi magiajn sonojn (kio dependas de bela vetero), tamen ĝis nun neniu povis klarigi, kio kaŭzis la sonojn. Post tio ni vizitis la belegan Wudangtemplon konstruitan antaŭ pli ol 300



ESP-NOVAĴOJ

Esp-novaĵoj de esp-organizoj kaj individuoj estas bonvenaj al ni. Pro tio, ke nia eldona periodo estas iom longa, ni esperas, ke la novaĵoj kiel eble plej frue atingos nin, precipe la anoncetoj pri Esp-movado, almenaŭ 3 monatojn antaŭ la apero de nia revuo. Bonvolu sendi ilin al s-ro Wang Hanping, El Popola Ĉinio, P.O. Kesto 77 CN-100037 Beijing, Ĉinio. Koran dankon pro via kunlaboro.

La Red.


● Memore al la 136-a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof esperantistoj de Dandong, Liaoning-provinco, kunvenis en la 14-a de januaro 1996. En la kunveno s-ro Zhang Junguang (Ĝang Ĝjungaŭ), prezidanto de la Dandong-a E-Asocio, raportis pri ĝia laboro en 1995 kaj prezentis ĝian aranĝon por aktivadoj en 1996. 10 aktivuloj estis laŭditaj en la kunveno. (Li Liang)

● La 16-an de decembro 1995 la Xinxiang- (Ŝinŝjang)-a E-Asocio de Henan-provinco okazigis sian 95' simpozion kaj feston de Zamenhof. 8 disertaĵoj estis prezentitaj al la kunveno, kaj iris ankaŭ konkurso de Esperanta konversacio.

(Han Daozhu)



Partoprenantoj de 95' simpozio de la Xinxiang-a E-Asocio kaj festo de Zamenhof




Memorkoverto emisiita de la Dalian-a Poŝtmarka Kompanio

● Memore al la 50-jara jubileo de la Popola Radio Dalian, Liaoning-provinco, la Dalian-a Poŝtmarka Kompanio emisiis en la 16-a de januaro 1996 du memorkovertojn kun poŝtmarko omaĝe al la Jaro de Muso. La kovertoj estas poŝtstampitaj respektive en la ĉina lingvo kaj en la angla kaj Esperanto. Iliaj projektintoj estas s-ano Xue Feng k.a. (Cao Kede)

● La 1-an de novembro 1995 la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de Ĉinio emisiis poŝtmarkoserion "Pejzaĝo en la Monto Sanqing" kaj poŝtkarton "Tutaĵo de la Musa Jaro". En la emisia tago la Haikou-a Poŝtmarka Kompanio uzis memorigajn poŝtstampilojn respektive en la ĉina lingvo kaj Esperanto, kies desegninto estas s-ro Zhang Linrui (Ĝang Linĵuj).

● En septembro 1995 Mondpac-preĝa Ceremonio estis organizita en Katmandu, Nepalo, sub la kunlaboro de la membroj de "Mondpac-preĝa Societo" kaj iu alternejo de Katmandu. En la ceremonio oni uzis la internacian lingvon Esperanto. La standardo kun la frazo "Paco regu en la mondo" vekis ĉe la ĉeestantoj grandan intereson pri Esperanto. La ceremonion ĉeestis multaj instruistoj, studentoj kaj aliaj personoj.



En la Mondpac-preĝa Ceremonio en Katmandu

● En 1995 la OSIEK-anoj (Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj) proponis 5 librojn premiindajn. La Gazeto povis jam prezenti 4 el ili en sia junia numero (LG 59). La 21-an de julio, dum la konferenca kunveno en Varsovio, duobla sekreta voĉdonado atribuis la premion al Donald Broadribb pro lia traduko de *La Respubliko de Platono*. Gratulon al la aŭstralia filozofoj! La premio, kies nuna valoro estas 300 ekuoj, rekomencas vivantan aŭtoron de nefikcia verko, originala aŭ tradukita. (OSIEK)

● La 15-an de aŭgusto 1995, en sia naskiĝurbo Litomiŝlo mortis Esperanto-verkisto Karolo Piĉ. Tuj post lia morto liaj familianoj kaj amikoj decidis starigi Fondaĵon Karolo Piĉ (FKP) kun la

ENRIQUE KOHEI (Argentino):

Mi konis la landon de mia patro

MI naskiĝis en Argentino, la plej suda lando de la amerika kontinento. Mia patro estis ĉino de la urbo Kanton, kaj laborante en angla ŝipo, li eskapis kaj restis en Argentino. Imagu tion antaŭ dekoj da jaroj, kiam tio estus ebla, ĉar la dogan-kontroloj ne estis tiom premaj.

Post iom da tempo li edziĝis al landanino kaj havis kelkajn gefilojn, el kiuj unu estis mi. Mia patro spertis fortajn lingvajn malfacilaĵojn, sed li sin aranĝis pro granda manlerteco, kiu ebligis al li akiri laboron por vivteni sin kaj la familion.

Sed li certe sentis lingvan kaj



La aŭtoro

nacian izolecon, dum multaj jaroj en nia urbo Rosario li estis la sola ĉino. Kompreneble la fremdeco estis fidela akompananto

kaj iomete la idoj ricevis tiun sintenon. Malofte li parolis pri sia lando, kaj vere ni ne interesiĝis.

Jam post lia morto mi lernis Esperanton, kaj tiel mi havis la oportunon legi la revuon "El Popola Ĉinio". Tiam ekĝermis intereso ĉe mi pri Ĉinio, kaj la revuo estis ne nur la plej bona informilo, sed ankaŭ la plej bona edukilo pri la kulturo de miaj prauloj. Tiom kreskis la interesiĝo, ke jam en mia lando mi aranĝis kelkajn ekspoziciojn pri Ĉinio, kaj la materialo uzita devenis preskaŭ komplete de "El Popola Ĉinio".

Al la revuo mi dankas, ke ĝi konigis al mi la landon de mia patro. ■

intenco teni viva la memoron pri la verkisto kaj zorgi pri la eldono kaj konstanta haveblo de liaj verkoj. La Fondaĵo estas instalita ĉe Iltis-Eldonejo, kiu ĝis nun zorgis pri la eldono de la verkoj de Karolo Piĉ. Iltis-Eldonejo, Postfach 600130, D-66067 Saarbrücken, Germanio. (R. Haupenthal)

● Post dumonata kurso en Garliava, urbeto apud Kaunas de Litovio, la kursfinintoj decidis fondi E-klubon por praktiki la lingvon. La 3-an de septembro en la aŭditorio de la urba biblioteko, la ĵus naskita klubo faris sian unuan E-aranĝon por la tuta komunumo de Garliava, okaze de disdono de la atestoj al la kursfinintoj, kaj okazigis ekspozicion de libroj, gazetoj kaj fotoj. La klubanoj deziras korespondi tutmonde kaj bonvenigas Esperantaĵojn kaj esperantistojn. Skribu al: s-ino Aldona Grikiĉiene, darbininku g-ve, n-ro 74-1, LT-4316 Garliava, Kauno raj., Litovio.

(Aristophio)


● La Hungara Esperantista Semajno okazos en Budapeŝto inter la 29-a de junio kaj la 5-a de julio. La ĉefaj programoj konsistos el Konferenco pri "Turismo kaj komunikado", artaj prezentadoj en Esperanto, turismado en Hungario kaj lingvo-kurso por komencantoj kaj progresintoj. Hungara Esperanto-Asocio, H-1061 Budapeŝto, Andrassy ut 27, Hungario. (Hungara Esperanto-Asocio)

● La 28-a Tutpollanda Esperanto-Kongreso kaj 35-jariĝo de la Filio de PEA en Gliwice okazos samtempe inter la 13-a kaj 18-a de julio 1996. En la programo estas planataj interalie kunvenoj de diversaj E-sekcioj (fervojistoj, kolektantoj, medicinistoj ktp.), prelegoj ligitaj kun mediprotektado, diskutoj pri la problemoj kaj la estonteco de la E-movado en Pollando. Detalajn informojn kaj aligilojn vi ricevos de Esperanto, skr. poczt. 21, PL-44-101 Gliwice, Pollando.

(Pola Esperanto-Asocio)



Ho, bela saketo!



Danco kun jaŭ-oj

EN JAŬ-A VILAĜO



Teksto de **PANG NAIYING**

Fotoj de **HAN HONG**

Nia vojaĝo al jaŭ-a vilaĝo estis tre agrabla. Kiam mi kaj miaj kolegoj el la redakcio de "El Popola Ĉinio" atingis tiun montvilaĝon, ni estis tuj ravitaj de la belaj pejzaĝoj. Tie kreskis altaj antikvaj arboj, lirlis klara rivereto kaj kantis subtropikaj birdoj. Surfostaj domoj staris en la kvieta naturo. Tiutage la vilaĝo estis aparte vigla. Festvestitaj, vilaĝaninoj kantis popolkantojn foje refoje. Nin interesis la belaj saketoj kaj broditaj globetoj tenataj en la manoj de la vilaĝaj knabinoj.

Kun scivolemo ni alivestis nin per jaŭ-aj vestoj. Knabinoj proponis al ni naciajn kostumojn, kiuj tamen ne taŭgas por ni pro trostrikteco. Ni en tiuj vestoj aspektis tre ridigaj. En senĝena ridado oni ekfrapis tamburojn kaj ni, urbaninoj, ekdancis imitante la jaŭ-ajn virinojn, dum la viroj ekludis stango-puŝadon per ventro.

Kun bedaŭro ni adiaŭis la vilaĝon. Vilaĝanoj akompanis nin ĝis la vilaĝfino. Tie ni refoje renkontis la knabinojn, kiujn ni vidis ĉe la komenco de la vizito. Ili fervore proponis al ni vinon kaj kantis por ni toston.



1. Samideanoj el la redakcio de "El Popola Ĉinio"
2. "Trinku!"
3. Kiu estas pli forta?

- 1
- 2
- 3



Papilio kaj gruo

(Figia popolarakonto)

EN la trankvila maro punktita de la insuloj de Figioj iu gruo estis vadanta malrapide, kaj tiam io eksidis sur ĝian kapon.

Pensinte, ke tio estas plumo, la gruo klopodis forskui ĝin, sed zorge rigardinte, la gruo surpriziĝis, ĉar ĝi vidis etan flavan papilion.

“Foriru!” la gruo grakis kolere. “Vi tiklas min, sur ĉi tiu insulo multas lokoj, kie vi povas flugi senĝene.”

La papilio koleriĝis pro la malfableco de la gruo kaj sidiĝis denove sur ĝian kapon kaj frapetis per siaj flugiloj la okulojn de la gruo. La papilio diris: “Mi evitas vin kiom eble, sed la vento blovis min sur vin. Ne koleru, ĉar miaj molaj flugiloj ne povas vundi vin.”

“Kompreneble vi ne povas vundi min,” diris la gruo. “Mi volas vadi senĝene. Foriru, stulta fiinsekto!”

Frumatene de la sekvanta tago la papilio decidis iri al la malproksimaj insuloj de Tongo por viziti siajn parencojn kaj amikojn. Sed ĝi ne povis atingi Tongon per siaj propraj flugiloj. Ruze okulmezurinte la fortan sveltan korpon de la gruo, la papilio pensis, ke la vojaĝo al Tongo estus efektivebla per la flugpovo de la gruo.

La papilio sin frapetis kontraŭ la kapon de la gruo: “Baldaŭ mi vojaĝos al Tongo. Sendube vi ne povas fari tion. Ĉu malfortulo posedus la forton flugi tiel malproksimen, ĉu stultulo posedus sciojn pri sekvenda vojo por tia vojaĝo?”

La gruo fiksrigardis la papilion malestime: “Kompreneble mi povas flugi al Tongo, sed mi estas feliĉa resti sur ĉi tiu insulo, kie abundas bongustaĵoj.”

“Ha, ha! La salikokoj apud Tongo estas trioble pli grandaj ol tiuj ĉe ĉi tiu insulo. Kaj oni bezonas nur kelkajn horojn por atingi Tongon,” diris la papilio.

La gruo salivumas, pensante pri la bongustaĵoj, sed ĝi estis malla-

borema. Ĝi diris: “Facile troveblaj manĝaĵoj abundas ankaŭ ĉi tie. Mi ne volas iri al Tongo.”

“Mi almenaŭ kredas, ke vi ne povas flugi al Tongo. Ja estas strange, ke mi estas pli forta ol vi.”

“Kompreneble mi povas atingi Tongon pli frue ol vi,” kriis la gruo.

“Do ni vetu, kiu la unua atingos Tongon.”

“Vi ŝercas kompreneble,” diris la gruo, sed konsentis, pensinte, ke la eta papilio laciĝos kaj cedos rapide.

Do ili kune ekflugis al Tongo.

Efektive la ruza papilio ripozis nerimarkite sur la dorso de la gruo dum preskaŭ la tuta vojaĝo kaj preterflugis nur kiam ĝi pensis, ke la gruo volas reiri al Figioj.


La superruzita gruo tute ne atendis, ke la papilio utiligis ĝian flugpovon.

Vesperiĝis. La lacega gruo apenaŭ povis plu flugi antaŭen. Fine ĝi dronis en la maro.

La papilio daŭrigis la flugadon sola, sed ĝi same kiel la gruo dronis en la maro. Ĝi mortis pro sia stulteco.

Do nek la gruo nek la papilio atingis Tongon, dum en Figioj la papilioj vivaj kaj sanaj flugas feliĉe. ■

Esperantigita de
ROBERT ROBINSON
(Aŭstralio)



Urbeto sur altebenaĵo

Teksto de HU YUN

Fotoj de XU YE

LA unua impresio donita de tiu urbeto sur altebenaĵo al mi, veninto el Pekino, estis, ke tie la ĉielo estas aparte lazura kaj nuboj aparte blankaj. Urbano diris al mi, ke la loko estas 3 400 m super la marnivelo. Jen kial mi marŝis en la urbeto kvazaŭ sur kotonon kaj devis halti por spiregi, kiam mi iris iom rapide.

Deqen(Deĉen)-subprovinco de Yunnan estas unu el la 10 tibet-naciaj aŭtonomaj subprovincoj de Ĉinio, kaj en tiu altebenaĵa urbeto estas la sidejo de ĝia registaro. Eble pro tio, ke la urbeto estas la centro politika, ekonomia kaj kultura de la subprovinco, ĝi portas la nomon Centra Urbeto. Tieaj loĝantoj diris al mi, ke antaŭ tre longe oni iris tra la loko de landinterno al Tibeto por komercado. Oni ŝanĝis teon, bronzaĵojn kaj brunan sukeron de Yunnan kontraŭ ĉevaloj, bovoj, ŝafoj, juveloj, drogherboj kaj aliaj tibetaj produktaĵoj.

La ĉefa strato de la urbeto estas rekta kaj asfaltita, borderita de butikoj kun nelarĝa fasado kaj domoj 2-3-etaĝaj. Sur la strato estis malmultaj pasantoj. Mi promenis tie kaj de tempo al tempo haltis antaŭ standoj de drogherboj. Iu tibet-nacia vendisto en tibeta robo fervore proponis al mi diversajn drogherbojn. Mi sciis, ke ili estas produktaĵoj sur altebenaĵo, sed ne konis ilian kurzon nek ilian kvaliton, do mi ne intencis aĉeti. Pro tio sur lia sunbruna vizaĝo legiĝis bedaŭro.

Deqen abundas je drogherboj. De la lastaj jaroj armilario (*Armilaria edoides*), speco de fungo, estas multe ŝatata. Ĉiujare ĝi grandkvante


vendiĝis al Japanio. En la urbeto estas nemalgranda fungo-foiro. Laŭdire, alilandanoj ŝatas tian fungon ĉefe pro tio, ke ĝi ne estas poluciita. Alia tre ŝatata produkto de Deqen estas tulipo importita el Nederlando. En ĝia flora sezono tulipokultivistoj vendas ĝin en la urbeto, kaj ĝi alportas belon al la urbeto. Sendube tulipokultivistoj profitas el tio.

En legombazaro ĉe la strato vendiĝis freŝaj legomoj de multaj specoj. Mi demandis iun vendistinon, ĉu la legomoj estis produktitaj en la loko. Ŝi respondis, ke iuj estis kulturitaj en la loko kaj aliaj transportitaj el aliaj regionoj. Nur de la lastaj jaroj la loĝantoj sur la altebenaĵo povas manĝi freŝajn legomojn. Iu tibet-nacia legomvendistino diris al mi, ke la lokanoj ne povis ĝui legomojn antaŭe pro malriĉeco kaj pro manko de legomoj. "Kaj kion do vi manĝis anstataŭ legomo?" mi demandis. "Ni prenis buter-teon, nemankigeblan por nia ĉiutaga vivo," ŝi respondis. Tiam mi rimarkis, ke ŝi ne estas tiom pli aĝa. Ŝi portis belan kaptukon. Ŝia vizaĝo estis iom maldelikata kaj sunbruna, tamen ŝiaj okuloj brilis en la suno.

Dum mia restado en la Centra Urbeto buter-teo vere fariĝis mia ĉiutaga trinkaĵo. Sed nur en la hejmo de tibet-nacianoj oni povas ĝui ĝin kun vera gusto. Tiun tagon mi frapis je iu pordo, kaj iu junulino malfermis ĝin. En la korto staras 2-etaĝa ligna domo en tibeta stilo. En la supra etaĝo loĝas ŝiaj familianoj kaj en la malsupra — brutoj. La ĉambro estas granda kun dikaj lignaj kolonoj. Ŝi sidigis min ĉe fajrujo kaj ekpreparis por mi buter-teon en ligna sitelo. En la fajrujo funkciis granda elektra forno. Sur ĝi sidis akvo-kruĉo. Ŝi dispecigis brikon da teo, metis ĝin en la kruĉon, poste iom da salo kaj butero en la sitelon, verŝis en ĝin bolintan te-akvon el la kruĉo kaj kirlis en ĝi per ronda ligna plato kun longa tenilo. Tion farante, ŝi diris al mi, ke ŝi nomiĝas Asi kaj estas han-o. Ŝia edzo entreprenas komercon en alia loko, dum ŝi faras dommas-trumadon kaj kamplaboron. Mi diris al ŝi, ke ŝi aspektas kiel tibet-nacia virino. Honte ridetante, ŝi konfesis, ke ŝi jam kutimiĝis al tia vivo. En la loko ofte okazas geedziĝo inter tibet-nacianoj kaj han-oj, kaj ili vivas faliĉan vivon. Nur tiam mi rimarkis, ke en ŝia ĉambro estas nemalmultaj modernaj elektraj aparatoj, ekz. televidilo, mikroonda forno kaj elektra marmito. "Bonvolu trinki," ŝi verŝis bongustan buter-teon en bovlon arĝente borderitan, kaj en la ĉambro tuj dispor-tiĝis agrabla aromo de buter-teo... ■




Tibet-nacia virino portanta akvon





En legombazaro


Foto de ZHANG MEIZHI



Lignaj kradoj servantaj por sekigi grenplantojn



Sur altebenaĵa paŝtejo



FACETOJ DE LA ĈINA SOCIO

Kiel pasigi semajnfinojn?

de JIAN JUN

ĈIUSEMAJNE oni laboris 6 tagojn po 8 horoj, al tio kutimis multaj laboruloj en Ĉinio, kiuj frumatene iris al laboro kaj revenis hejmen je vesperiĝo ĉiutage. Eĉ en dimanĉo ili devis fari dommastrumadon. Tiam ili revis pri dutaga semajnfino.

En la 1-a de majo 1995 la revo realiĝis: en ŝtataj oficejoj, orga-

nizoj, entreprenoj ktp. oni eklaboris 5 tagojn ĉiusemajne. En la pasinta unu jaro la ĉinaj laboruloj ĝuis dutagan semajnfinojn.


POR TURISMO

Iun semajnfinojn de junio 1995, ĉe Yanqi (Janĉji)-lago en antaŭurbo de Pekino, mi renkontis geedzojn ĉ. 50-jarajn, kiuj ripozis ĉe la bordo post remado, dum iliaj gefiloj iris plezurveturi

per motorboato. Dum nia interparolado la edzo diris: "Niaj gefiloj eldomigis nin. Ludante kun ili eksterdome, ni ŝajne rejuniĝis. Nun ni ripozas du tagojn ĉiusemajne. Ni ĝuas unutagan ekskurson kaj faras dommastrumadon en la alia tago." "Ekskurso multe kostas," diris la edzino. "Nun estas tempo por turisma vojaĝo, kaj ni elspezis 200-300 juanojn unufoje en monato. Tamen tio indas, ĉar ni ĝuas plezuron."

Mi informiĝis, ke en la unua monato, kiam oni ekhavis dutagan semajnfinojn, venis al Yanqi-lago en ĉiu semajnfino ĉ. 6 500 turistoj, kiom en la aliaj 5 tagoj. Estas kelkdek turismaj lokoj kiel Yanqi-lago en la antaŭurbo de Pekino, kie oni povas fari piknikon, fiŝhokadon kaj remadon. Multaj pekinanoj pasigas semajnfinojn en antaŭurbaj turismaj lokoj.

En Ŝanhajo oni forlasis domojn kaj iris en la sinon de montoj, lagoj kaj ĝardenoj — suden al Hangzhou (Hangĝoŭ), Ningbo kaj Wuyi-monto; nordokcidenten al Suzhou (Suĝoŭ), Wuxi (Uŝji) kaj Nankino. Ferio-trajno nun servas al turistoj.



Sur glitejo

Eldomiĝi por turisma vojaĝo estis kvazaŭ modo de ĉinaj urbanoj en 1995. Laŭ statistiko, 0.5 miliardo da ĉinoj turisme vojaĝis en 1995, je 10% pli multe ol en 1994. Multaj urbanoj preferas vojaĝon eĉ mallongan por proksimiĝi al la naturo.

POR BUTIKUMADO KAJ RENDEVUO

En Pekino, la taga vendovaloro de la fama magazeno Wangfujing (Ŭangfujing) kreskis al 4-5 milionoj da juanoj post la apero de dutaga semajnfino en Ĉinio. Kaj en Ŝanhajo, komercistoj kaptis la ŝancon. Ili plilongigis servotempon de magazenoj kaj starigis bazarojn kun favora prezo en semajnfino. Ankaŭ la popolanoj bone utiligis la dutagan semajnfino. Antaŭe la mastriroj estis tre okupitaj en dimanĉo. Ili vizitis magazenojn hasteme. Sed nun la virinoj povas viziti butikojn de vestoj kaj kosmetikaĵoj dum la tuta tago. Ne gravas, ĉu ili aĉetis ion aŭ ne. La celo estas ripozi kaj sin plezurigi.

Se infanhavaj geedzoj ambaŭ laboras kaj havas gepatrojn, do ili dediĉas duonon de semajnfino al siaj infanoj — aŭ kune ludi, aŭ helpi ilin en lernado. Krome, la geedzoj ne forgesis viziti siajn gepatrojn, kiujn ili vizitis antaŭe nur en festoj. Nun ĉiumonate 2-3-foje ili faras ian hejmlaboron por la gepatroj kaj manĝas kune kun ili, ĝuante la familian feliĉon.

Geedzoj Jin (Ĝin) ne havas

infanon, kaj iliaj gepatroj loĝas en alia provinco. Ili ambaŭ laboras en kompanio, do en semajnfino ilia hejmo fariĝis kunsido de iliaj geamikoj. Ili babiladis, aŭskultis muzikon, rigardis televidajn programerojn, preparis manĝaĵojn kaj vespere ludis kartojn. S-ino Jin diris: “En labortempo mi estas okupita de ofertado kaj ne volas eldomiĝi en semajnfino. Nun mi kunestas kun miaj geamikoj unu tagon



Patrinoj kaj filoj en librejo

kaj ripozas en la alia. Bonege.”

POR LERNADO KAJ HOBIO

Specimena enketo diras, ke en dutaga semajnfino preskaŭ duono de la urbaj laboruloj eldomiĝis — aŭ butikumi, aŭ viziti turismajn lokojn, aŭ rendevui amikojn. Kaj la aliaj hejme ĝuis televidajn programerojn, legis librojn kaj ĵurnalojn kaj aŭskultis muzikon. Unu jaron post ekpraktikado de la sistemo de dutaga semajnfino iuj pensas pri lernado kaj hobio.

Nemalmultaj plenkreskuloj lernas en semajnfino por havigi

al si novajn sciojn kaj sukcesi en sociaj konkuroj. Postlaboraj lernejoj por plenkreskuloj funkcigas “semajnfinajn kursojn”, kiuj favoras al laboruloj. En la kursoj oni instruas komputikon, fremdan lingvon kaj ankaŭ kosmetikon, fasonadon, florumadon, etiketon kaj familian administradon.

Antaŭ 3 jaroj s-ro Li Xin (Li Ŝin) diplomitiĝis el universitato kaj eklaboris en ŝipfabriko, kie li ne estis okupita. La profesio ne estis laŭ lia deziro. Somere de 1995 li studis la anglan lingvon en ĉiu semajnfino kaj en la jarfino li trapasis ekzamenon por labori en telekomunikacia kompanio investita de Ĉinio kaj Usono. Nun li povas plene elvolvi sian talenton. Li estas okupita, sed kun plezuro li diris: “La dutaga semajnfino ŝanĝis mian vivon, nun ĉiun semajnfino mi studas duontage.”

Semajnfine, multaj homoj venis al la Ĉina Popola Universitato en Pekino. Ili estas plenkreskuloj, kiuj lernas fremdan lingvon, kontadon, juron, komputikon ktp.

Multaj aliaj en semajnfino kolektas kuriozaĵojn, kaligrafas, ludas muzikilon aŭ sportas.

En la moderna socio la altiĝo de produktiveco dependas ne plu de plilongigo de labortempo. Nun en pli ol 140 landoj oni laboras 5 tagojn semajne. La samo okazis en Ĉinio. Tio montras, ke ankaŭ la ĉinoj ŝanĝis siajn tradiciajn konceptojn pri laboro kaj ripozo. ■

BAJ-A TAGO

Teksto de HAN HONG

Fotoj de SHI ZUOMO

Maje de ĉiu jaro la baj-oj en Yunnan-provinco, sudokcidenta Ĉinio, solenas la Tagon de Rizid-priklado. Tiutage ĉe la unua kokeriko la baj-aj kamparanoj en festaj vestoj iras kun laboriloj al rizkampo. La rizkampo estas dividita en plurajn egalajn kvadratajn parcelojn kaj ĉiu virino estas preta prikli rizidojn en difinita parcelo. Tuj ĉe la sunleviĝo la prikla juĝisto, gvidante 5 aŭ 6 junulojn kapablajn ludi muzikilojn, iras al la rizkampo, kun triangulaj koloraj flagoj, *surna*-oj, gongoj, cimbaloj kaj aliaj muzikiloj. La juĝisto estas prestiĝa vilaĝano.

Laŭ ordono de la juĝisto oni ekludas la muzikilojn, dume la virinoj komencas intensan prikladon. En la konkurso oni de tempo al tempo laŭte kantas por kuraĝigi la priklantojn kaj aŭdiĝas la ritma muziko "Priklado" por kuraĝigi la priklantojn. En la varma kaj gaja etoso la virinoj manipulas lertajn maĵojn antaŭ la rigardantoj.




Ĉe la sunsubiro finiĝas la intensa laboro kaj la vilaĝanoj komencas gajan dancadon.

1. Dancantaj gejunuloj
2. Konkurso pri rizid-priklado
3. Juĝisto
4. Juĝistoj en prezentado
5. Matene priklantoj direktas sin al rizkampo, akompanate de muziko ludata per *surna*-oj.

1	2
	3
4	5



DE RIZID-PRIKLADO



Ĉinio detale

de STEFAN MAUL (Germanio)

Li Qiang/Zhang Meizhi: *Enciklopedieto de Ĉinio*. Tradukis el la ĉina Fan Yizhu, polurita de Xu Senrong. Eld.: Ĉina Esperanto-Eldonejo, Beijing, 1994. Ilustrita. 322 p. ISBN: 7-5052-0086-0. Prezo ĉe FEL: 240 BEF + afranko, ĉe UEA: 19,50 NLG + afranko + AVI.

Mi treege ŝatas ĉinajn vermiĉelojn, sed manĝante ilin, mi ĉiam frontas la problemon de ties terura longeco. Ekde nun mi pli volonte batalos kontraŭ tiu ĉi obstaklo, ĉar mi scias, ke vermiĉeloj estas la tradicia ĉina manĝaĵo en naskiĝtago, kaj ke ili simbolas longan vivon. Tiun ĉi ĝojigan informon kaj aldone la detalon, ke per bastonetoj oni multe pli facile majstras la enbuŝigon de l' bongustaj monstroj, mi dankas al mirinde detala *Enciklopedieto de Ĉinio*, kiu laŭ mi ne meritigas la bagateligan sufikson -et. Vere, el ĝiaj pli ol 300 paĝoj (en formato DIN A5) vi ekscias ĉion pri geografio, historio, naturo, kulturo kaj ĉiuj aliaj facetoj de l' vastega lando. Iom retene-maj, la aŭtoroj estas nur pri nunaj politiko kaj ekonomio, tamen ekzemple oni ekscias, ke apud la fama Komunista Partio, ekzistas ok aliaj partioj aŭ partisimilaj movadoj.

Kiel ajn, jen ege valora konsultlibro, pri kies enhavo mi ne bezonas plu rezonadi. Ankaŭ ĝia strukturo — spite al manko de indekso — estas bona kaj klara: rapide vi trovos tion, kio aparte interesas vin (kaj ja apenaŭ iu legos komplete tian libron). Solida kaj fidinda verko en foje iom seka, foje tamen ankaŭ plaĉa stilo kun fajna ironio, en klara lingvaĵo,


kiel ni danke konas ĝin el multaj artikoloj de *El Popola Ĉinio*. La sola afero, kiu vere ĝenis min, estas la propraj nomoj aŭ pli ĝuste la uzata latinlitera transskribo. Certe, en tio la tradukinto frontis gravan problemon, kaj mi komprenas, ke ne ĉiujn (pre-

cipe geografiajn) nomojn oni povas esperantigi. Sed krom Pekino, Ŝanhajo kaj Flava Rivero lasi ĉiujn nomojn kun la multaj literoj q, x, y, sh, zh kaj kombinaĵoj de tiuj literoj ege malfaciligas la legadon; ke eĉ oni skribas Taiwan (foje Tai-wan) anstataŭ Tajvano, tio eble havas politikan motivon, sed tio ja sendube ne povas validi por la centoj da aliaj propraj nomoj, pro kiuj oni konstante stumblas kaj falas de la Granda Muro en grandajn marĉojn de literĝangaloj. Se oni almenaŭ enmetus klarigon pri prononcado en iun tabelon!

La tekstojn krome kompletigas multaj mapoj kaj fotoj; en suplemento aperas kelkaj koloraj mapoj kaj aro

da koloraj fotoj, precipe el naturo, kulturo kaj arto. Malgraŭ mia kritiko pri nomoj mi senhezite rekomendas al vi nepre aĉeti tiun ĉi enciklopedion; motivo por tion fari povas esti jam sole la fakto, ke ĝi markas mejloŝtonon en praktika apliko de la lingvo internacia. Komparebla verko ekzistas pri neniuj aliaj landoj! Kaj mi timas, ke ĝi dum longa tempo restos la sola, bedaŭrinde. Sed eble oni povus, montrante ĝin, konvinki koncernajn instancojn en aliaj ŝtatoj eldoni ion similan. ■

El "MONATO" 1995.11



Xi'an hodiaŭ

Teksto de ZHENG ZHENJIE

Fotoj de DA WEI



EN pluveta tago la urbo Xi'an estis vualita nebule. La grizaj antikvaj urbomuroj kaj la ĉirkaŭaj arbare starantaj domoj formis kvazaŭ gigantan tuĉpentraĵon. Starante sur ponto super la rivereto ĉe la urbomuro kaj rigardante la pejzaĝon, mi venis al la konkludo, ke la urbo estas kombinaĵo de la antikva ĉina kulturo kun la moderna civilizacio.

Xi'an travivis sian prosperon antaŭ pli ol 1 000 jaroj kaj la sekvantajn historiajn ŝanĝigojn kaj fine eniris en la 90-ajn jarojn de la 20-a jc. Ĝi fariĝis urbo ne nur kun brila antikva kulturo, sed ankaŭ kun potencaj scienc-teknikaj fortoj. Ĝi estas la tria scienc-teknika urbo de Ĉinio, post Pekino kaj Ŝanhajo.

EN LA KVARTALO DE ALTAJ LERNEJOJ

La pluvo fariĝis pli kaj pli milda. Restis kvietaj la urbomuroj konstruitaj surbaze de la imperiestra urbo en la meza kaj lasta periodoj de la 14-a jc. De tiam forpasis pluraj jarcentoj, sed ilia imponeco neniom malpliĝis. Ili estas la plej komplete konservitaj antikvaj urbomuroj en Ĉinio. El ili oni konstruis urbomuran parkon por la lo-

ĝantoj.


Forlasinte la parkon, mi veturis per taksio al la kvartalo de altaj lernejoj.

La kvartalo kun areo de pli ol 20 kvadrataj kilometroj situas en la suda parto de Xi'an. Tie troviĝas du trionoj de la altaj lernejoj de Xi'an, tial oni nomas la lokon "Kvartalo de altaj lernejoj".

Unue mi venis en Jiaotong-universitaton de Xi'an, faman en Ĉinio. En ĝia korto estas antikvaj konstruaĵoj kaj modernaj domoj. Ĝia rektoro Jiang Deming (Ĝjang

Deming) akompanis min en la vizito. Ni promenis sur vojeto ombrata de arboj kaj vidis la instru-domojn, bibliotekon, sciencan halon, komputeran centron, laboratorion, loĝdomojn, stadionon kaj naĝejon. La tuta korto estis pura kaj kvieta. Koncerne ĝian instruadon, rektoro Jiang diris, ke la universitato kun historio de cent jaroj ĉiam prenas kulturadon de altnivelaj sciencistoj-teknikistoj kiel sian fundamentan taskon. Nun ĝi organizas siajn instruistojn kaj studentojn en esplorado de 1 300 temoj kaj akiris fruktojn tre gravajn


SKEMA MAPO DE LOKOJ ĈE SILKA VOJO





1	2
3	4

1. La ĉefstrato Nandajie en Xi'an
2. En magazeno
3. Produktolinio por stebmaŝinoj en fabriko investita de Ĉinio kaj Japanio
4. Usonaj entreprenistoj vizitas fabrikon de la distrikto.







En la ekspluata distrikto de novteknika industrio de Xi'an



Prezentado de klasika teatraĵo

por la scienca kaj ekonomia disvolviĝo de Ĉinio. En 1994 la provinco Shaanxi efektiviĝis esploradon de 12 gravaj scienc-teknikaj temoj, el kiuj trionon plenumis Jiaotong-universitato de Xi'an. Nun po-grande produktiĝas kineskopoj kun 720-linioj/colo por televidilo kun 37-centimetra diagonalo kaj komenciĝis provproduktado de kineskopoj kun 1 024-linioj/colo por televidilo kun 51-centimetra diagonalo.

Mi informiĝis, ke en Xi'an estas entute 42 altaj lernejoj kaj 510 scienc-esploraj stabloj. El ili la plej famaj estas la Xi'an-a Optika Instituto de Precizaj Mekanikaĵoj sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, Xi'an-a Instituto de Horloĝa In-

dustrio kaj Xi'an-a Mezur-rega Centro de Satelitoj, komandejo de la ĉina kosmonaŭtika mezur-rega reto. La grandnombraj altaj lernejoj, institutoj kaj 328 mil sciencistoj-teknikistoj konsistigas scienc-esploran sistemon, kombinantantan scienc-esploran kaj instruadon kun produktado. De 1970, kiam la unua ĉina artefarita satelito estis lanĉita, ĝis la tago, kiam la reprenita satelito venis precize en la difinitan lokon, de la sukcesa lokalizo de la simultana ter-satelito ĝis la eknavigado de la telekomunika satelito "Azio n-ro 1" en la spaco kaj en la naskiĝo de la unuaj ĉinaj komputero, integra cirkvito, mikroelektronika komputero kaj kolora kineskopo estis plene montritaj la saĝo kaj penado

de Xi'an-anoj kaj scienc-teknikaj fortoj de la urbo.

REVO PRI AVIADILOJ

En la antikveco, kiam komercistoj kaj pilgrimantoj vojaĝis sur la Silka Vojo, eble ili revis, ke iam estos veturilo, kiu transportos la homojn super la senlima dezerto. Nun ilia revo jam realiĝis. Nuntempe aerlinioj jam etendiĝas al ĉiuj lokoj de Ĉinio kaj la aviada industrio de Ĉinio rapide disvolviĝas. Tiutage mi havis interparolon kun s-ro Cui Lintao, urbestro de Xi'an. Li diris al mi, ke la aviadila kvartalo situas en la nordorienta parto de Xi'an, kun areo de sep kvadrataj kilometroj. La Xi'an-a Aviadil-industria Kompanio estas la plej granda entrepreno en la urbo kaj ankaŭ la plej granda fabriko de aviadiloj en Ĉinio. Post la fondiĝo en la komenco de la 60-aj jaroj ĝi imite fabrikis kaj mem projektis aviadilojn de pli ol 30 tipoj. El ili la aviadiloj "Yun-7" kaj "Yun-8" estis plej multe uzataj kiel pasaĝer-aviadiloj de Ĉinio. La vertikala vosto de la usona aviadilo Boeing 737 estas prilaborita kaj muntita de la Xi'an-a Aviadil-industria Kompanio. En 1984, kiam la usona Boeing-kompanio kaj la Xi'an-a Aviadil-industria Kompanio faris kontrakton pri fabrikado kaj muntado de vertikalaj vostoj por 100 aviadiloj, iuj usonanoj ne kredis, ke Ĉinio havas la kapablon produkti ilin, sed kiam la kompanio sukcesis fabriki ilin laŭ la kontrakto, la du kompanioj subskribis la duan tian kontrakton. Nun la Xi'an-a Aviadil-industria Kompanio ricevis ne nur licencon pri produktado de pecoj por Boeing-kompanio, sed ankaŭ tiun por Kanado, Germanio, Italio kaj la kompanio "Eŭropaj Aer-busoj". En 1995 la Xi'an-a Aviadil-industria Kompanio kaj aliaj tri aviadil-kompanioj de Ĉinio produktis internacie avangardajn pasaĝer-aviadilojn kun 150 sidlokoj projektitajn de la Aerveturila Kompanio McDonnell Douglas. La naskiĝo de tiuj aviadiloj markis la finiĝon de la historio, en kiu Ĉinio ne kapablis produkti

grandajn pasaĝer-aviadilojn. Urbestro Cui daŭrigis, ke Xi'an urbiĝis antaŭ 3 100 jaroj. En Tang-dinastio (618-907) ĝi atingis la kulinon de sia disvolviĝo kaj en ĝi vivis pli ol miliono da loĝantoj, sed post Tang-dinastio ĝi iom post iom dekadencis. En 1949, kiam naskiĝis la nova Ĉinio, en ĝi loĝis malpli ol 400 000 homoj, kaj ĝia jara industria produktovaloro estis nur 100 milionoj da juanoj. Oni povas diri, ke la Xi'an-a Aviadil-industria Kompanio estas modelo de la industria disvolviĝo de Xi'an. Krom la kvartalo de altaj lernejoj, aviadila kvartalo, tie estas ankaŭ kvartaloj de tekstila, elektronika kaj elektra industrioj. Tekstila, mekanika, elektronika, trafika kaj ilmaŝina industrioj jam fariĝis ĉefaj industrioj de Xi'an. Industriaj produktaĵoj de la urbo vendiĝas en Japanio, Usono, Kanado, Eŭropo kaj Afriko.

NOVAJ KVARTALOJ DE LA URBO

Kiam Xi'an eksportas siajn industriajn produktaĵojn al diversaj lokoj de la mondo, ĝi konstruas la modernan Silkan Vojon al diversaj mondpartoj. Kompare kun la antikva Silka Vojo, la moderna estas

pli larĝa, pli ebena kaj pli facila, ĉar ĝi konsistas ne nur el interkruĉigantaj ŝoseoj, fervojoj, sed ankaŭ el aerlinioj. Tie funkcias la nova flughaveno — Xianyang - (Ŝjanjang)-a Internacia Aerodromo, kaj ankaŭ komunika reto, kiu ligas la urbon kun preskaŭ ĉiuj landoj.

Xi'an denove fariĝis internacia urbo multe vizitata de komercistoj. Sed nun oni venas tien ne sole por

silkaĵoj, sed ankaŭ por investado de modernaj entreprenoj kun la celo produkti nov-teknikajn varojn.


Malproksime de la malnovaj kvartaloj de la urbo estas nova ekspluata distrikto, kie leviĝis antaŭ nelonge multaj nov-teknikaj entreprenoj. Ĝi estas nova fenestro por koni la urbon.

Kiam ni atingis la lokon laŭ la

En matena foiro ekster la urbomuro



En biblioteko de la Nordokcidenta Universitato



Instruistino de Jiaotong-universitato helpas alilandajn studentojn.



En la muntejo de la Xi'an-a Aviadil-industria Kompanio

larĝa asfaltita vojo, ni sentis grandan agrablecon. 12 larĝaj stratoj dividis la distrikton de 22.35 kvadrataj kilometroj en multajn mal-samgrandajn partojn. S-ro Zhao Yuhua, estro de la distrikta administracio, diris al mi, ke en 1991 la distrikto estis sankciita kiel ŝtata ekspluatejo kaj de tiam ĝis la fino de 1994 tie fondiĝis sume 2 119 entreprenoj, inkl. de 212 entreprenoj investitaj de 19 landoj kaj regionoj. Nun 400 entreprenoj po-grande produktas varojn. 1 500 scienc-esploraj fruktoj estas aplikataj en produktado de facile vendeblaj varoj, kiaj pecoj de altklara televida aranĝaĵo, komputero, altfunkcia klimatizilo kaj ciferra interŝanĝilo.

Akompanate de s-ro Zhao, mi vizitis fabrikan de kompresoroj. En ĝi produktaĵoj estas farataj sur aŭtomata produkta linio. De ĝia funkciulo mi informiĝis, ke unu el ĝiaj investantoj estas Chunlan-grupo, la plej granda entrepreno de klimatiziloj en Ĉinio. Ĝi distingiĝas per siaj scienc-teknikaj fortoj. El la 380 laborantoj de la entrepreno estas 112 teknikistoj. Iujn gravajn laborojn tie faras robotoj.

Mi vizitis ankaŭ la Fratan Norman Industrian Limigitan Kompanion kune investitan de Ĉinio kaj Japanio. Tie estas vasta fabrikdomo kaj aŭtomataj produktaĵaj linioj. Kiam mi eniris en iun laborejon, mi vidis, ke laboristoj faras la

lastan kontrolon de la varoj. La tie fabrikataj stebmaŝinoj plejparte estas nigraj. Oni diris al mi, ke la konstruado de la kompanio komenciĝis januare de 1994, kaj post unu jaro la kompanio komencis produktadon kaj nun ĝiaj produktaĵoj eksportiĝas al Japanio, Usono, Singapuro, Germanio, Hongkong kaj aliaj landoj kaj regionoj.

Antaŭ vespermanĝo mi forlasis la ekspluatitan distrikton plenan de vikleco. Tie la blankaj domoj kaj brilantaj lampoj kvazaŭ parolas pri la rilatoj inter la nova kaj malnova distriktoj. La distrikto montras ĉarmecon samkiel la antikva urbo Xi'an. Ĝi apartenas al la pasinteco kaj ankaŭ al la estonteco. ■

“MI AĈETIS NUR DOLĈAJN”


Pentraĵoj de SUN XIAOFEI




1. En la antikveco iu sinjoro ordonis al sia servisto aĉeti dolĉajn pomojn.



2. La servisto venis al pomĝardeno kaj gustumis pomojn.



3. La sinjoro ekmiris, vidinte la morditajn pomojn.



4. La servisto sin senkulpigis: “Mi gustumis ĉiujn pomojn kaj aĉetis nur dolĉajn.”

Revenigu kriplulojn al la vivo

— Vizito al la Ĉina Konvaleska Esplora Centro

TIO estas neordinara hospitalo. Sur ĝia tegmento okulfrapas grandaj ĉinaj vortoj "Homama Hospitalo". La atendejo estas vasta kaj hela, plena de tenera kaj kvieta etoso. Inter la pacientoj nemalmultaj estas kripluloj sidantaj sur rulseĝo. En la koridoroj kaj necesejoj senescepte instaligis milde leviganta senobstakla deklivo kaj apogrelo speciale por kripluloj. Ĉie videblas universalaj signoj... La hospitalo ja estas la Ĉina Konvaleska Esplora Centro, kiu donas konvaleskan kuracon speciale al


kripluloj.

Nun en Ĉinio estas pli ol 60 milionoj da kripluloj. Nemalmultaj el ili ne estas denaske kriplaj. Atakite de subita malsano aŭ akcidento, ili konservis la vivon, tamen kripliĝis malsamgrade je la korpo aŭ cerbo. La primara tasko de la konvaleska medicino, kiu aperis antaŭ 50 jaroj, ja estas resanigi tiujn kriplulojn. Parolante pri tio, s-ro Wang Jiacong (Ŭang Ĝjacong), vicdirektoro de la Ĉina Konvaleska Esplora Centro, diris, ke vera konvaleskado estas malsama ol kuracado en malsanulejo

kaj traktado en sanatorio. Ĝi sin-teze uzas medicinan, inĝenierian, socian, edukan, psikan kaj labor-ekzercan metodojn por kompletigi, altigi aŭ restarigi la perditajn aŭ malfortigitajn korpajn aŭ animajn funkciojn de kripluloj, por helpi ilin partopreni kiel sanaj homoj en la socia vivo. En tiu senco, la celo de konvaleska laboro estas ne sole konservi la vivon de kripluloj, sed ankaŭ revenigi ilin al la socia vivo.

Por tiu celo la Ĉina Konvaleska Esplora Centro en la komenca periodo post sia fondiĝo en 1988 instalas plej avangardajn kuracajn ekipaĵojn, kiel nuklea magneta resonatoro, komputertomografilo kaj kolora Doppler-ehografilo B, kaj ankaŭ kompletan da ŝajne simplaj, sed fakte tre sciencaj konvaleskaj instrumentoj. Same por tiu celo la centro persiste aplikas konvaleskan teknikon, kiu strikte kombinas la modernan medicinon kun la tradicia ĉina medicino, donas al pacientoj ĉi-flankajn konvaleskajn servojn de sporta ekzercado, labora trejnado, fizioterapio, hidrototerapio kaj tradiciaj ĉinaj masaĝo, akupunkturo kaj mokso, kaj ankaŭ necesaj medikamenta kuracado, ortopedia operacio kaj instalo de braka aŭ krura protezo. Malsame ol alilanda laŭperioda konvaleska kuracado, la Ĉina Konvaleska Esplora Centro ĉiam persistas en

Masaĝo



seria konvaleska kuracado, t.e. unue enhospitaligi pacientojn por urĝa savo kaj kuracado kaj poste fari al ili resanigan konvaleskadon. La centro eĉ instruas al pacientoj laborkapablon kaj helpas ilin serĉi taŭgan okupon por sin vivteni.

La 17-jara knabino Chang E falis de etaĝdomo, kio kaŭzis al ŝi kompletan difektiĝon de mjeloencefalo. Paraplegiĝinte, ŝi venis al la centro kaj tie ricevis pli-ol-9-monatan konvaleskan kuracadon. Kuracistoj plurfoje intime parolis kun ŝi kaj bone informiĝis pri ŝiaj bezonoj rilate al konvaleska kuracado, lernado, enoficiĝo kaj ĉiutaga vivo. Kiam ĉiuj ŝiaj funkcioj rimarkinde restariĝis kaj ŝi povis mem zorgi pri si en la ĉiutaga vivo, la centro helpis ŝin lerni tajpadon en la lingvoj ĉina kaj fremda. Post ŝia elhospitaliĝo koncernaj laborantoj de la centro vizitis ŝin hejme, helpis ŝin projekti kaj aranĝi hejman senobstaklan medion kaj helpis ŝiajn familianojn fari hejman konvaleskan ekzercan aparaton. Poste ili plurfoje kontaktiĝis kun diversaj flankoj por serĉi por ŝi taŭgan okupon kaj finfine sukcesis revenigi ŝin al la socia vivo.

“Mi nomiĝas Mingming. Mi havas du kaj duonan jarojn. Mi venis al la hospitalo antaŭ 2 monatoj,” diris al mi knabeto, kiu sub helpo de flegistino sin ekzercis en turniĝo maldekstren por sin levi. La flegistino informis al mi, ke ĉe la enhospitaliĝo Mingming ne kapablis paroli kaj povis kuŝi nur surdorse. Nun li povas rampi, sidi kaj sin levi per turniĝo dekstren. Kvankam li ankoraŭ ne povas flue paroli, tamen li povas klare sin esprimi. Li malrapide rampis al mi, prenis mian fulmolumilon kaj ŝaltis ĝin foje refoje.

Mingming estas unu el la malsanaj infanoj en la centro. En la lastaj 8 jaroj, sole la porinfana fako de la centro akceptis pli ol 2 000 malsanajn infanojn. Post 3-6-monata konvaleska kuracado


pli-malpli pliboniĝis la funkcio de iliaj korpopartoj.

En la infana kuracejo de la centro mi vidis, ke flegistinoj manĝigas al la infanoj, kiuj aĝas maksimume 14 jarojn. Pro la cerba paralizo iliaj manoj, okuloj kaj kapoj ne povas moviĝi harmonie. Flegistinoj zorgas ilin en ĉiu paŝo. Unu flegistino zorgas pri unu aŭ du infanoj, sekve la infanoj

ĝuas ne nur plej bonan kuracadon, sed ankaŭ amoplenan flegadon. La procentaĵo de la resanigitaj infanoj ĉiujare altiĝis, kaj en 1994 oni resanigis 85% de la malsanaj infanoj.

En la tradicia ĉina medicino masaĝo, akupunkturo, mokso, preno de drogherboj kaj fomentado havas apartan kuracofikon por konvaleskado de malsana korpo, sekve kombini la modernajn konvaleskajn teorion kaj teknikon kun la tradiciaj ĉinaj medicino kaj konvaleskado por fari sintezan konvaleskan kuracadon al pacientoj estas granda avantaĝo de la Ĉina Konvaleska Esplora Centro.


Zung Yin Yong estas magnato de la ekonomia rondo de la Korea Respubliko. Antaŭ kelkaj jaroj pro cerbovaskula afekcio li hemiplegiĝis kaj estis alkatenuita al rulseĝo. Kvankam kelkaj fortaj flegistoj bone zorgis pri li kaj portis lin tien kaj ĉi tien, tamen tio neniom reduktis lian doloron en la koro kaj korpo. Dum pluraj jaroj li vizitis multajn grandajn hospitalojn en kaj eksterlande, tamen la konvaleska efiko ne estis ideala. Printempe de 1992 li venis al la Ĉina Konvaleska Esplora Centro por kuracado. La centro esploris lian malsanon kaj faris al



Ŝi helpas kriplan infanon turni sian korpon.

li akupunkturon, masaĝon, sportan kaj laboran ekzercadon kaj ankaŭ necesan psikan kaj medikamentan kuracadon. La originala ĉina konvaleska kuracado iom post iom efikis sur lin. Li povas mem starigi sen alies subteno kaj iri pli ol 300 metrojn sen apogbastono. Antaŭ sia reveno al la patrolando li diris kun neretenebla ĝojo: “Mi ja devas forĵeti mian rulseĝon en la riveron Yangzi!”

En la pasintaj 8 jaroj la centro akceptis pli ol 6 000 pacientojn. Kvankam ne ĉiu kiel Zung Yin Yong atingis tian bonan efikon, tamen preskaŭ ĉiuj ĝojis pro sia malsamgrada efiko. Fakte, la centro portas sur si ne nur monton da taskoj de konvaleska kuracado, sed ankaŭ pezan taskon de konvaleskaj esplorado kaj instruado. Ĉiujare ĝi kulturas por la ŝtato nombron da altnivelaj konvaleskaj fakuloj, faras provlaboron de konvaleskado en kriplulaj societoj de iuj urboj kaj vilaĝoj. En la pasintaj 8 jaroj ĝi regule sendis kuracajn taĉmentojn al diversaj lokoj de la lando por helpi tieajn kriplulojn en ilia konvaleskado. Samtempe kun tio, ĝi kulturis dekojn, da konvaleskaj akupunkturistoj por Usono, Japanio kaj aliaj landoj. ■



S-ro Hou Yurui en la Unua Eŭropa Konkurso de Ĉina Kuirarto

TEMO PROPONITA DE LEGANTOJ

Ĉinaj laboruloj transmare

de SUN AIJUN

En la numero 2, 1995 de "El Popola Ĉinio" mi legis novaĵpeceton sur paĝo 42 je la fino de la ekonomia sekcio pri ĉinaj laboristoj en fremdaj landoj. Eble estontece vi povos havi grandan artikolon pri tiuj laboristoj, pri la landoj, en kiuj ili laboras, pri la specoj de laboro, kaj pri tio, kiel ili akiris laboron.

JAMES DAVIS (Usono)

S-RO Hou Yurui, 45-jara direktoro de la restoracio de la Pekina Labora Hotelo kaj ĉina superklasa kuiristo, rakontis al mi siajn travivaĵojn en Nederlando, kie li iam laboris, kaj projekciis por mi videobendon pri la Unua Eŭropa Konkurso de Ĉina Kuirarto okazinta en septembro 1995. Mi vidis, ke kuiristoj en blankaj kitelo kaj ĉapo preparas diversajn pladojn en kalejdoskopaj formoj kaj koloroj. Jen malvarma plado interese titolita "Orienta monto en pluvo kaj okcidenta en suno". S-ro Hou konigis al mi, ke tiu plado estis preparita de lia lernanto kaj gajnis la 6-an lokon en la menciita konkurso.

En 1995 la Ĉina Stela Korporacio por Internacia Ekonomia kaj Teknika Kunlaboro, la Ĝenerala Enoficiga Administracio de Nederlando kaj la Sekcio de Ĉinaj Restoracioj de la Nederlanda Reĝa Dungito-organizo kontraktis pri ekspedo de 100 ĉinaj kuiristoj al Nederlando por laborado. En marto de la sama jaro s-ro Hou, kiel membro de la unua karavano, venis al Nederlando. Oni taskis al li

trejnadon de lokaj senlaboraj kuiristoj kaj altigon de la kulinara arto de tieaj ĉinaj kuiristoj.

Dum tiuj 7 monatoj s-ro Hou instruis la kulinaran arton en kelkaj grandaj kaj mezgrandaj restoracioj de Nederlando kaj sciigis, ke transmaraj ĉinaj kuiristoj vivas ne tiel facile. De la lastaj jaroj, kaŭze de pliigo de alistilaj pladoj, ĉinaj pladoj estas ne tiel favorataj kiel antaŭe. En 1994 funkciis en Nederlando 2 800 ĉinaj restoracioj, kaj en 1995 malfunkciis 500 el ili, sekve de tio multaj ĉinaj kuiristoj perdis la laboron.

Laborante kiel kulinara instruisto en Nederlando, s-ro Hou estis bone salajrata. Li ellernis kulinaraĵajn metodojn de iuj eŭropaj pladoj. Tio tre helpas lian esploron por krei tian ĉinan kuirarton, kiu kaj reprezentos la ĉinan kulinaran kulturon kaj kontentigos la okcidentajn klientojn. Li estis invitita kiel unu el la juĝantoj de la Unua Eŭropa Konkurso de Ĉina Kuirarto. Du el la 15 ĉinaj kuiristoj de li instruitaj gajnis premiojn en tiu konkurso, kaj 7 el ili rehavigis al si laboron. Krome, estas tre ĝojige por s-ro Hou, fotografo-

amatoro, ke li povis vojaĝi al najbaraj landoj de Nederlando dum sia feriado kaj fotis multajn belegajn pejzaĝojn.

La Ĉina Stela Korporacio por Internacia Ekonomia kaj Teknika Kunlaboro, fondita en la komenco de la 8-a jardeko, estas la unua ĉina korporacio sin okupanta speciale pri laborserva eksportado. Laŭ interregistaraj interkonsentoj, popolaj kunlaboroj kaj aliaj manieroj kaj laŭ bezono de la kunlaborantaj registaroj, kompanioj, entreprenoj kaj aliaj klientoj, la Stela Korporacio faras diversajn ekonomiajn kaj teknikajn kunlaborojn. Ĝis la fino de 1995, la korporacio jam sendis proksimume 10 000 laborulojn al pli ol 70 landoj kaj regionoj, kaj pro tio ĝi enviciĝis inter la elstaraj samspecaj korporacioj de Ĉinio. Ĝia stabo estas en Pekino, kaj ĝiaj filioj dislokigas en- kaj eksterlande.

En aŭgusto 1994 la Singapura Aviada Kompanio komisiis al la Stela Korporacio varbi nombron da ĉinaj stevardinoj. Post plurfoja ekzameno, inter pli ol 1 000 kandidatoj el diversaj lokoj de Ĉinio 22 estis elektitaj kaj senditaj al Singa-

puro por rigora aviad-serva trejnado. Duonjaron poste, ili ĉiuj kvalifikis kiel stevardino. Ili subskribis kontrakton kun la Singapura Aviada Kompanio pri trijara servo. En la pasinta unu jaro ili tenis solidarecon, helpis unu alian kaj servis bone. Kelkaj el ili ricevis dank-leterojn de pasaĝeroj. Ili substrekas memkulturon kaj dediĉas plejparton de siaj postlaboraj horoj al progresiga lernado. Singapuraj amaskomunikiloj tiel taksis ilin: Belaj kaj senĝenaj ĉinaj stevardinoj alportis novan vigecon al la singapura aviado. Fraŭlino Li Ning estas 22-jara pekina knabino. Ŝi ofte flugas al Pekino, kaj estas oportune por ŝi reveni hejmen. Same kiel aliaj knabinoj, ŝi tre ŝatas sian profesion en la Singapura Aviada Kompanio, ĉar unuflanke la enspezo multe pli altas ol tiu de la enlandaj kolegoj, aliflanke tio donas al ŝi ŝancojn sin hardi kaj havi maloftajn travivaĵojn.

De la lastaj jaroj la Ĉina Stela Korporacio ekspedas al Japanio pli kaj pli multajn lernantojn. Wang Jinglong (Ŭang Ĝinglong), bajnacia junulo el la provinco Yunnan de sudokcidenta Ĉinio, antaŭe havis nur unu deziron: perlabori monon kaj aĉeti kamionon por entrepreni individuan transportadon. En 1993 li kaj aliaj dekelkaj samvilaĝanoj estis ekspeditaj al iu lignaĵa fabriko de Aichi de Japanio. Tie li lernis novan teknikon kaj ankaŭ lukris multe da mono. En 1994, plenuminte la kontrakton, li revenis al Yunnan. Anstataŭ entrepreni individuan transportadon, li

S-ro Wang Jianzhong en Japanio



fariĝis estro de loka lignaĵa fabriko. Aplikante en praktiko la lernitajn teknikojn kaj administran sperton, li revivigis tiun malprofitantan fabrikan.

Wang Jianzhong (Ŭang Ĝianĝong) estas agrikultura teknikisto de iu terkultura kompanio en la provinco Gansu de nordokcidenta Ĉinio. En 1994 li venis al Japanio kaj tie laboris 18 monatojn, samtempe li serioze studis agrikulturan produktaĵan teknikon kaj administrajn metodojn de Japanio. Sur la foto donacita de li al la Ĉina Stela Korporacio mi vidis, ke li manipulas kombajnaron sur rizkampo.

Tio estas ekzemploj de diversprofesiaj laboruloj eksterlanden ekspeditaj de la Ĉina Stela Korporacio. Ĝenerale, ĉinaj laboruloj laborantaj eksterlande estis ekspeditaj de tiuj ĉinaj kompanioj, kiuj rajtas fari eksteran laborservan kunlaboron. La ekspeditoj havas kapablon aŭ kompetentecon.

Tiel frue kiel en la 5-a kaj 6-a jardekoj, la ĉina registaro ekspedis laborulojn al Sovetunio kaj al aziaj kaj afrikaj landoj por partopreni en ilia ekonomia konstruado. Sed la oficiala starto de la ĉina ekstera laborserva kunlaboro datumis en 1979, kiam la Ĉina Voj-Ponta Korporacio la unuan fojon sukcese adjudikis la konstruadon de la ponto n-ro 4 de Mousure, Irako. Post la 16-jara evoluo Ĉinio jam posedas pli ol 500 kompaniojn, kiuj entreprenas eksteran laŭkontraktan konstruadon aŭ sin okupas speciale pri la laborserva eksportado. Interalie, iuj kompanioj, kiaj la Ĉina Ŝtata Konstru-ingenieria Korporacio kaj la Ĉina Voj-Ponta Korporacio, jam enviciĝis inter la 225 laŭkontrakte labor-plenumantaj entreprenoj, plej grandaj en la mondo.

La ekstera laŭkontrakta laboro kaj la laborserva eksportado de Ĉinio ko-

menciĝis en Jemeno, Irako kaj aliaj okcidentaziaj kaj mezorientaj landoj, kaj en la lastaj 16 jaroj multe progresis ankaŭ en merkatoj de suda kaj sudorienta Azio kaj de la Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj. Nun Azio estas la ĉefa merkato de la ekstera laborserva kunlaboro por Ĉinio. La ekstera laŭkontrakta laboro koncernas konstruadon, metalurgion, soseon, elektran energion, telekomunikadon, mekanikon, malpezan industrian, ŝipon kaj eĉ spacan navigadon, nuklean elektrejon ktp. La eksportitaj laborservoj koncernas diversajn kampojn, kiel prospektorado, muntado, trejnado, riparado, komputera softvaro kaj kuirarto.

Laŭ la freŝdataj statistikoj de sia Ministerio de Eksteraekonomiaj Rilatoj kaj Komerco, Ĉinio entreprenas la laŭkontraktan konstruadon kaj laborservan eksportadon por pli ol 170 landoj kaj regionoj, kaj tiurilate ekspedis laborulojn je pli ol miliono da homoj. En la fino de 1995 pli ol 280 000 ĉinoj laboris eksterlande. Ĉinio okupas 3% de la internacia laborserva merkato.

S-ro Li Donglin, 38-jara ĝenerala direktoro de la Ĉina Stela Korporacio, konvinkiĝis pri la perspektivo de la ĉina ekstera laborserva kunlaboro. Li diris: "La internacia laborserva kunlaboro havas grandan latentan forton. Same kiel turismo, ĝi estas senfuma industrio kaj tuj post ekspluatado vigligos aliajn rilatajn fakojn."

Ĉinio havas grandan loĝantaron kaj multe da laboruloj. La ekstera laborserva kunlaboro povas doni pli da ŝancoj por enoficigo kaj trejnado de laboruloj, kaj plie, akceli multflankan ekonomian kunlaboron inter Ĉinio kaj aliaj landoj. Nun la ĉina Ministerio de Eksteraekonomiaj Rilatoj kaj Komerco ellaboris serion da ankoraŭ pli malfermaj kaj liberaj politikoj kaj rimedoj por daŭre disvolvi la eksteran laborservan kunlaboron, kaj aktive ekspansiigas laborservajn merkatojn eksterlande. Laŭ takso, 400 000 ĉinoj laboros eksterlande en la fino de la jaro 2000. ■

Plenan amon al la filo



Gu Baozhi kaj ŝia filo

“**E**STUS bone, se mi donus miajn okulojn al mia filo, por ke li vidu la bluan ĉielon kaj bambuojn antaŭ la pordo de mia hejmo!” kun vespiro diris Gu Baozhi, rigardante sian filon kun profunda amo.

S-ino Gu Baozhi, kiu laboras en la Zhengzhou-a Politekniko, neniam imagis al si, ke en la pasintaj 23 jaroj ŝi jam faris lumon ne nur por sia filo, sed ankaŭ por la socio per sia senlima patrina amo...

“NE SUFERU MIA FILO!”

Tio estis bela diketa bebo. Akuŝistino tenis la bebon en la brakoj kaj ne volis demeti lin. Tiam Gu Baozhi, 33-jara, sentis grandan ĝojon pro patri-niĝo. Ŝi kaj ŝia edzo donis al sia bebo la nomon Gu Hao.

Sed tri monatojn post la naskiĝo de la bebo, ŝia kolego, kiu laboris en la politeknika kliniko, diris al ŝi: “Gu, ŝajnas al mi, ke estas io anormala en la okuloj de la infaneto. Iru al hospitalo, por ke oni ekzameni lin.”

La ekzameno certigis, ke la bebo suferas de denaska hiperplazio de fibromembrano. Gu Baozhi tion ne kredis. Ŝi kun sia filo veturis al Pekino kaj Ŝanhajo, por ke tieaj famaj hospitaloj ekzameni lin. Sed ĉiuj tiuj hospitaloj konfirmis la malsanon, kontraŭ kiu la ĉinaj kaj alilandaj kura-

cistoj ankoraŭ ne havas efikan rimedon.

Gu Baozhi dronis en malespero. Ŝiaj larmoj falis senĉese. Ekster ŝia atendo, ŝia edzo volis fordoni la bebon por havi alian. Ankaŭ Gu Baozhi tre deziris sanan infanon, tamen ŝi neniel povis konsenti kun la edzo. Pro tio ili decidis eksedziĝon. Farante divorcan interkonsenton, ŝi havis nur unu premison: la filo apartenu al la patrino. Sen ajna ekscitiĝo ŝi diris al la parencoj kaj amikoj: “Ne gravas, ke mi ion suferu, sed gravas, ke la bebo ne suferu.”

Fakte, estas ege malfacile por virino prizorgi kriplan infanon sen helpo de aliaj. Tiam la infano jam eklernis piediri, kio multe malfaciligis la prizorgadon. Gu Baozhi devis porti kun si la filon, eĉ kiam ŝi estis en necesejo. Poste ŝi petis helpon de sia patrino. Foje, kiam la infano kuris, la maljuna avino ne povis kuratingi lin kaj ŝi kaj la nepo ambaŭ falis sur ŝoseon.

S-ino Gu ne povis ne forlasi sian fakon kaj transposteniĝis al la politekniko kaj sin ekokupis pri instrua administrado, ĉar la politekniko sidas trans ŝoseo kontraŭ ŝia loĝejo kaj ŝi havas pli da tempo por prizorgi la infanon.

POR KE LI FARIĜU UTILA AL LA SOCIO

Estis vintro en Zhengzhou. Blovis frosta vento. Gu Baozhi endomiĝis, tenante la manon de sia filo,

kiam la horloĝo jam batis la 20-an. Ŝi demetis sian surtuton, proponis akvon al la malsana patrino kaj hastis al la kuirejo por prepari vespermanĝon.

La urba lernejo de blinduloj situas en la okcidenta antaŭurbo, je 10 km for de ŝia hejmo. Gu Baozhi ĉiutage akompanis sian filon al la lernejo. Ŝi faris tion tri jarojn, ĝis kiam la knabo al kutimiĝis al la lerneja vivo.

Gu Baozhi, diplomito de instruista lernejo, bone scias la gravecon de edukado. Ŝi faris ĉion eblan por kulturi la filon en homon utilan al la socio. Kiam la infano eklernis paroli, ŝi legis famajn fabelojn ĉinajn kaj alilandajn per ĉina komuna parollingvo. Kiam la filo volis scii pli multe, ŝi rakontis al li pri eminentaj ĉinaj kaj alilandaj kripluloj, kia Helena Keller, kiu faris grandan kontribuon al la socio. Kiam la infano havis juĝkapablon, ŝi interŝanĝis siajn opiniojn kun li samkiel kun sia amiko.

Ŝi kunfandis sian esperon kun la ĉiutaga vivo de la infano. Ĉe manĝotablo Gu Hao sciigis pri multaj vegetaĵoj kaj bestoj kaj ĉe promenado pri arboj, birdoj, domoj, herboj kaj floroj. Ŝi instruis lin lavi vestojn, prepari manĝaĵojn, boligi akvon kaj infuzi teon.

“Panjo, kio estas koloro?” la demando de la filo unuafoje metis la patrinon en embarason.

Kelkajn tagojn poste, Gu Baozhi invitis instruiston de akordiono al la hejmo. Ondoj da novaj melodioj venis al Gu Hao en la orelojn: la varmaj estas ruĝaj; kvietaj — blankaj; malĝojaj — nigraj... La edukado vekis ĉe Gu Baozhi poezian imagon. Eble la blinda knabo neniam konos koloron kaj formon, tamen li ekamis muzikon. Gu Baozhi, ŝparema, petis du instruistojn instrui ŝian filon. Nun se Gu Hao nur dufoje aŭskultas ordinaran komponaĵon, li scipovas ludi ĝin per akordiono.

Por riĉigi la vivon de la filo, Gu Baozhi aĉetis plej bonajn radioricevilon kaj magnetofonon. Gu Hao enamigis en sporton ĝuste pere de la sono el la aparatoj. La tre okupita patrino tute hazarde eksciis, ke venas tempo por Gu Hao praktike uzi siajn sciojn.

Tio okazis en ordinara rendevuo de ŝiaj universitataj kunlernantoj. Ĝin partoprenis Gu Baozhi kaj ankaŭ ŝia filo. Tiam iris la 15-a Mondpokala Piedpilka Konkurso kaj oni nature parolis pri ĝi. “Ne, tiun pilkon enŝotis sportisto Baggio de la itala teamo, ĉe la punpunkto.” Per la diro Gu Hao mirigis la patrinon kaj ĉiujn apudestantojn. Demandite, Gu Hao detale konigis la interesan ludon, eminentajn piedpilkajn stelojn kaj ludon de la ĉina teamo en la 13-a, 14-a kaj 15-a Mondpokalaj Piedpilkaj Konkursoj. Lia rakonto tre interesis la aŭ-

skultantojn. Ĉe la fino oni varme aplaudis lin.

Alifoje, du raportistoj de la programero “Voĉo de Kripluloj” de radiostacio de Zhengzhòu rekomendis la knabon al gvidantoj de la stacio. Poste Gu Hao invitite prezidis la programeron “Sportoj”. Li estas la unua blindulo-prezidanto de la programero “Sportoj” en Ĉinio.

La blinda Gu Hao vekis sensacion ĉe la aŭskultantoj, kiuj skribis kaj telefonis al li por esprimi sian ŝaton al la programero kaj respekton al li. Iu studento volis fini sian vivon pro blindiĝo, sed aŭskultinte la radio-elsendon, li disŝiris sian testamenton. Vidinte ĉion ĉi, Gu Baozhi ekploreĝis, tenante la radioaparaton. Antaŭe la filo bezonis alies helpon, sed nun oni bezonas lian. Tiuj ŝajne hazardaj aferoj montris la nepran rezulton de klopodado de la patrino dum la 23 jaroj.

“MI DEZIRAS VIDI MIAN PANJON!”

Kiam Gu Baozhi eksedziniĝis, ŝi aĝis malpli ol 40 jarojn. Oni plurfoje svatis ŝin, por ke ŝi havu novan familion. Ankaŭ ŝi deziris helpon de nova edzo, tamen ŝi ĉiam metis ties sintenon al la filo sur la unuan lokon, pro tio malsukcesis plurfoja svato. Nun ŝia filo plenkreskis. Iu ĉina ambasadoro, kun kiu ŝi konatiĝis antaŭ kelkaj jaroj, skribis al ŝi plurfoje por denove peti ŝian manon. La belaj pejzaĝoj de la lando, kie li laboras, liaj alta staturo kaj erudicio donis al ŝi profundan impreson, sed kiam ŝi informigis, ke lia laborkondiĉo malpermesas, ke ŝi kaj ŝia filo kune vivu ĉe li, ŝi decideme rompis la rilatojn kun li.

Nun Gu Hao fariĝis utila homo, sed li bezonas pli da helpo de sia patrino. En la ĵurnaloj estas multaj novaĵoj pri sportoj, tamen ne estas koncertaj brajlaj materialoj. Krom la de ŝi menditaj eldonaĵoj, ŝi devas serĉi por sia filo materialojn en biblioteko.

La patrino ĝojas, ke la filo jam plenkreskis, kaj tre deziras, ke iu bonkora knabino akompanu lin dum la tuta vivo.

Foje, Gu Baozhi estis vundita en trafika akcidento. Hejme, la filo jen portis bolintan akvon al la patrino, jen demandis, kion ŝi volas manĝi. Najbaro diris kun emocio: “Gu Hao ja estas bonega junulo. Bedaŭrinde, al li mankas okuloj.”

“Mi kaj mia panjo havas paron da komunaj okuloj,” tuj respondis la junulo.

Antaŭ nelonge la Centra Televizio de Ĉinio telesendis intervjuon kun Gu Hao kaj lia patrino. Raportisto demandis: “Gu Hao, kion vi volus vidi antaŭ ĉio, se vi havus vidkapablon?”

“Mian panjon,” senpripense respondis la junulo. Tiumomente la rigardantoj vidis, ke en la okuloj de la patrino brilas larmoj. Oni diris, ke ŝi estas feliĉa patrino. ■

Alilanda entreprenado en Ĉinio



S-ro Zhang Youpu

LA Mangaĵa Limigita Kompanio Luxing, investita de japano, fondiĝis antaŭ 3 kaj duona jaroj en la ekspluata distrikto de Yantai. Ĝi rapide disvolviĝis. En la komenco post sia fondiĝo la kompanio havis nenun fabriklondon. 7 monatojn poste, la unuaperioda konstruo kun areo de pli ol 9 000 kvadrataj metroj plenumiĝis. Post unujara entreprenado la kompanio akiris profiton de 4 milionoj da juanoj kaj 8.5 milionojn da fremda valoro kaj komencis la duaperiodan konstruon per la reprenita kapitalo.

“Ĉio ĉi estis farita de s-ro Zhang,” tiel diris s-ro Shin-Ichi

Matsudaira, japana direktiestro de la kompanio. Li atribuis la sukceson de entreprenado al saĝa ĉino Zhang Youpu, kiu, kiel ĝenerala direktoro de la kompanio, akiris konfidon de la japana entreprenisto ne nur pro sia saĝeco, sed ankaŭ pro sia sincereco.

Antaŭ dekkelke da jaroj s-ro Shin-Ichi Matsudaira venis al Ĉinio. Li interesiĝis pri la fiŝbreda riĉfonto ĉe la marborda urbo Yantai. Kiel aliaj alilandaj komercistoj ankaŭ li deziris koni la merkatan kurzon de Ĉinio, ekz. fonton de komercaĵoj liveritaj de Ĉinio kaj iliajn prezojn, kaj trovi kunlaboranton, kiu povas sincere konduki al li. Tiam li renkontiĝis kun Zhang Youpu, oficisto en la

Oceana Fiŝkapti Kompanio de Yantai. Zhang opiniis: “La kunlaboro celas reciproke utilon kaj favoron. La entreprenado povos sukcesi, nur se ambaŭ flankoj kune penas, ne suspektante unu la alian.” Li ekveturigis ŝipon al profunda maro por esplori varfonton kune kun s-ro Shin-Ichi Matsudaira. En unu monato ili postlasis siajn spurojn preskaŭ ĉie ĉe la marbordo de Jiaodong (Ĝjaŭdong). Dum esplorado, ili provproduktis saŝimiojn (angle: *sashimi*), kiuj rapide elĉerpiĝis en la japana merkato.

Ĝoja kunlaboro komenciĝis. Fondiĝis Haixing-kompanio kune investita de Ĉinio kaj Japanio, kun Zhang Youpu kiel ĝenerala direktoro. Ĉiam severe observante la regularon, Zhang Youpu senrezerve malkaŝis al la japana kolego ĉiujn aferojn koncernantajn la interesojn de ambaŭ flankoj, inkl. de kontoj, etatoj, kvitancoj de aĉetvaroj kaj konsumo. Dank’ al la kuna penado de ili ambaŭ, post tri jaroj la kompanio reprenis ĉiujn investitajn 500 000 usonajn dolarojn, kaj post pliaj du jaroj la kompanio havis 5 milionojn da juanoj da neta profito.

Ĉio ĉi gravuriĝis en la koro de la japana entreprenisto. Kaj poste li decidis starigi en Ĉinio la kompanion Luxing kaj donis la administran rajton al Zhang Youpu. La decido de la japano estis saĝa,

ĉar Zhang Youpu kun memstara administrecio rapide turnis la personan sincerecon en la kolektivon.

Komence, la ĉinaj oficistoj kaj laboristoj en Luxing-entrepreno laboris ne tiel entuziasme, timante, ke iliaj interesoj ne estos garantiataj. Rimarkinte tion, Zhang Youpu okazigis kunvenon kaj malkaŝe diris: "Ne gravas, al kiu apartenas la entrepreno, sed gravas tio, ĉu ni povas nin formi en unu kolektivon. Se la entrepreno prosperos, ankaŭ ni profitos." Post nelonge la kompanio ekfunkciigis manĝejon por siaj oficistoj kaj laboristoj. Ili manĝas po 3 pladojn. La monata elspezo por la vivteno estas malpli ol dekono de la salajro. Ili ĝuas senpagan loĝadon kaj kuracadon en la kompania kuracejo. En liberaj horoj ili senpage ludas bilaridon, tablotenison, kantas en karaokejo... Duonjaron poste profito de la kompanio multe kreskis kaj ĝiaj 30 oficistoj kaj laboristoj enloĝiĝis en nova domo. La alilanda kompanio akiris konfidon de la ĉinaj oficistoj kaj laboristoj.

Administrante alilandan entreprenon, Zhang Youpu ankaŭ faras al siaj subuloj ideologian edukadon, la tradician ĉinan entreprenan sperton, tamen li faras tion laŭ sia propra maniero anstataŭ kunvenado kaj predikado. Li ofte kune kun siaj subuloj ludas, kantas, montogrimpas, naĝas, pentras, kaligrafas... Dank' al la komuna ĝojo oni pene laboras.

Laŭ Zhang Youpu talentaj kaj respektataj devas esti tiuj, kiuj bone plenumas sian laboron, kaj pro tio ili devas ricevi pli da salajro. Li precipe alte taksas la teknikistojn, kiuj posedas novajn teknikojn, kaj racie pagas al ili salajron. Se oni serioze laboras en la kompanio, oni ricevas salajron pli multan ol la difinitan je 140% jare.

Entreprenei Luxing per avangardaj administraj rimedoj estas kompreneble. Por tio Zhang You-

pu 8-foje vizitis Japanion. Li bone sciis, ke pro diferencaj kondiĉoj inter Ĉinio kaj Japanio senŝanga ripetado de la pensmanieroj, vivkutimoj kaj laborstiloj de japanoj estas malfacile akceptebla de la ĉinoj. Ĉi-rilate oni devas atenti la efikon.

oficistoj kaj laboristoj partoprenu en ĝia administrado. La ĉinaj dungitoj ĉiutage devas prezenti al la kompanio profesian raporton pri sia laboro, aktualaj problemoj en la kompanio aŭ proponoj. Iu oficisto el financa sekcio skribis: "La lampoj en la duperioda kon-



Prilaborado de marproduktaĵoj en la kompanio Luxing

Laborante kune kun s-ro Shin-Ichi Matsudaira plurajn jarojn, Zhang Youpu tre admiras lian grandan amon al la kariero. Ĉi-matene s-ro Shin-Ichi Matsudaira ellitiĝas je la 4-a, unue li legas du horojn, poste preparas matenmanĝon kaj eklaboras je la 7-a kaj duono. Li malofte manĝas en restoracio, ekskluzive de apartaj bezonoj. Li regalas gastojn per kare-rizo, fritita kuko el terpomo, frititaj pektenoj kaj plado da maralgoj produktitaj de la kompanio.

Zhang Youpu lernas de li la spiriton kaj laboras ĉiutage almenaŭ dek horojn. Tamen li ne postulas de la subuloj tiel labori, kun la celo fari nerimarkatan influadon sur ilin.

La kompanio postulas, ke ĉiuj

struejo hele prilumas la entreprenojn, sekve ne necesas lumigi la lampojn en la kadro de la entrepreno." Ankaŭ la 5-minuta matena kunveno de la japanaj entreprenoj praktikiĝas en la kompanio. En la matena kunveno oni diras tion, kion oni pensas. Junaj novicoj de la kompanio diras: "Nun jam malvarmiĝas, kaj oni devas multe sin vesti." "Iuj lokoj en la laborejo devas esti riparitaj."... Tio sentigas, ke la oficistoj kaj laboristoj de la entrepreno jam unuigiĝis en solidan kolektivon.

De sia ekfunkciigo ĝis nun la kompanio Luxing eĉ ne difinis severan horaron, tamen neniu el ĝiaj membroj malfruiĝis al aŭ foriris frue de la laboro. ■

Vizaĝornamoj de antikvaj ĉinaj virinoj

de HUA MEI

CIUJ ŝatas belecon, precipe virinoj, kiuj emas ĉarmigi siajn haŭton kaj sensorganojn. Por tiu ĉi celo ili ornamas sian vizaĝon per diversaj ŝminkoj laŭ sia ŝato kaj estetika moro en la socio. La moro cirkulis de la antikveco inter la ĉinaj virinoj, kiuj plibeligis sin per malsamaj vizaĝornamoj.

BLANKA ŜMINKO, ERCO KUN NIGRA PIGMENTO KAJ KARTAMO

En la libro "Kantoj de Chu", kompilita antaŭ pli ol 2 200 jaroj, legiĝas, ke ĉinaj virinoj ornamas la vizaĝon per blanka ŝminko, pentras la brovojn per nigra pigmento kaj ŝmiras la haŭton per balzamo. La tiama poeto Song Yu priskribis en sia verko la naturan belecon de najbara knabino tiel, ke ŝi estus tro blanka, se ŝminkita blanke, kaj ŝi estus tro ruĝa, se karmine ŝminkita. Laŭ li ŝi estis ege bela, ke ne necesis por ŝi sin ŝminki. El tio evidentiĝas, ke tiutempe preskaŭ ĉiuj ĉinaj virinoj sin ŝminkis, dum la ĉinaj viroj neniel trovis tion stranga.

Estis du specoj de blankaj ŝminkoj en la antikva Ĉinio, t.e. pulvoro de rizo kaj tiu de plumbo kaj stano. Oni preparis ŝminkojn ankaŭ el aromigitaj kaj pulvorigi-

taj leonuro (*Leonurus*), gipso, semoj de niktago, talko kaj subtilaj ercoj. En tombo de la Orienta Han-dinastio (25-220) en Min-feng de Xinjiang (Ŝingĵang) estis trovita brodita saketo kun ŝminko, la plej frua atesto en Ĉinio ĉi-rilate.

Miksita kun akvo, nigra pigmento estis uzata por ŝminki la brovojn. En tomboj de Jiangxi (Ĝjangŝji), Jiangsu kaj Guangxi estis malkovritaj ercoj kun nigra pigmento.

Antaŭ 2 000 jaroj hunoj loĝis ĉe la monto Yanzhi en nordokcidenta Ĉinio. Sur la monto kreskis sennombraj kartamoj, per kies pulvoro virinoj ornamis sian vizaĝon. Kiam regis imperiestro Liu Che (140-87 a.K. sur trono), la hunoj perdis la montojn Qilian kaj Yanzhi en milito kaj post tio la virinoj ne plu havis ŝminkon por sin plibeligi. En la 4-a jc oni aldonis al kartama pulvoro bovmedolon kaj porkograson por prepari ŝminko-kremon.

MATENRUĜA KAJ UME-FLORA VIZAĜORNAMOJ

En Ĉinio multaj vizaĝornamoj furoris unue en kortego kaj poste inter la popolanoj.

En la periodo de Tri Regnoj, Cao Pi (187-226), imperiestro de Wei-regno, havis palacan knabi-



Fresko de Mogao-ŝtonkavernaro en Dunhuang



Silka bildo en Tang-dinastia tombo de Xinjiang



Terakota homfiguro en Tang-dinastia tombo en Shaanxi

non Xue Yelai (Ŝjue Jelaj). Foje li legis en lamplumo malantaŭ kristala ekrano larĝa je pli ol du metroj. Pro nevidado la alvenanta Xue frapis sin kontraŭ la ekranon kaj vundis al si la vizaĝon. Post resaniĝo restis sur la vizaĝo cikatro simila al malaperonta matenruĝo. Tamen la imperiestro amis ŝin kiel kutime. Sekve de tio, la palacaj knabinoj imite ornamis sian vizaĝon per ŝminko. Oni nomis la ornamon matenruĝa vizaĝornamo aŭ ruĝvanga ornamo.

En la Sudaj Dinastioj imperiestro Liu Yu (363-422) havis principinon Shouyang. Iutage ŝi iris en la palaco. Subite zefiro venigis sur ŝian interbrovon umefloron, kiu ne povis forskuiĝi. Jen formiĝis Shouyang-vizaĝornamo (alivome umeflora vizaĝornamo), kiu furoris iom poste. Eĉ en la regperiodo de imperiestro Hui-zong (1100-1125 sur trono) cirkulis ankaŭ versoj pri vizaĝornamo.

La diboĉema imperiestro Yang Guang (569-618) de Sui-dinastio (581-618) inspektis floton en Jiangdu (nun Yangzhou) kaj vidis, ke sur ĉiu ŝipo remas milo da belaj knabinoj. Inter ili knabino Wu Jiangxian (U Ĝjangŝjan) kun longe ŝminkitaj brovoj vekis ŝaton de la imperiestro. Favorata, ŝi estis nomumita oficistino. Ĉiuj knabinoj de la imperiestra palaco imite ŝminkis la brovojn per nigra pigmento, ke eĉ ne sufiĉis 250 dekaltroj da nigra pigmento, kiujn ĉiutage disdonis al ili la kortego.

Historia libro diras, ke en la antikva Ĉinio multaj viroj ŝminkis sin. Inter ili estis talenta poeto Cao Zhi (192-232).

VIZAĜORNAMOJ EN TANG-DINASTIO

Tang-dinastio (618-907) estis tempo, en kiu kulminis la disvolviĝo de la ĉina historio. Tiam furoris buntaj vizaĝornamoj de virinoj. Modigis ne nur kutimaj vizaĝornamoj de han-naciaj virinoj en centra Ĉinio, sed ankaŭ tiuj de

la naciminoritataj. Ekz., iuj virinoj ŝminkis la frunton per flava pigmento kaj la brov-ekstrecojn per la ruĝa. Ili karminis la lipojn kaj faris po unu ruĝan punkton en la vango-kavetoj, kio plibeligis ilin. Terakotaj homfiguroj kaj silkaj bildoj elterigitaj en tomboj de Tang-dinastio en Shaanxi (Ŝenŝji) kaj Xinjiang montras, ke la tiamaj virinoj havis sur la interbrovo floron kaj sur la vangoj — pentritan aŭ algluitan bildon de ronda punkto, lunarko, monero aŭ birdeto. La flore ornamita vizaĝo de servistino sur fresko de Mogao-ŝtonkavernaro en Dunhuang montras, ke la moro daŭris ĝis post la lasta periodo de Tang-dinastio.

Brov-ornamo profunde prezentis la ĉarmon kaj imagipovon de virino. Imperiestro Li Longji (Li Longĝji) de Tang-dinastio aparte interesiĝis pri ŝminkitaj brovoj de virino kaj pro tio li ricevis la nomon brov-maniculo. Li ordonis fari dekbrovan bildon kaj ĉiujare donis al sia edzino Yang Yuhuan kaj aliaj grandan monsumon por ŝminkoj. Fratino de Yang Yuhuan ornamis la vizaĝon per simpla ŝminko. Tio markis, ke jam kulminis la vizaĝornamo de virino en la dinastio.

En 806-820 la ĉinaj virinoj ŝatis nigriĝi la lipojn. La ornamo ricevis la nomon larva vizaĝornamo kaj estis ŝatata nur por kelka tempo, ke ĝi sentigis belecon de malsanulo.

La imperiestra patrino Cixi (1835-1908), kiu tenis sceptron de la kortego de Qing-dinastio (1644-1911) dum dekoj da jaroj, alte taksis vizaĝornamon. Ŝi ŝminkis sin per perla pulvoro haŭtoprotektanta kaj eĉ persone kontrolis faradon de ŝminkoj. En la hospitalo de la imperiestra familio de la dinastio konserviĝis multaj receptoj por vizaĝornamo. Iuj el ili uzigas nun de ĉinaj virinoj.



Palaca knabino de Tang-dinastio

KURANTAJ AFEROJ

EKONOMIO

● En 1995 la surteraj olekampoj de Ĉinio produktis 140 milionojn da tunoj da nafto kaj 16 miliardojn da kubmetroj da naturgaso, kio estis rekorda en la ĉina historio.

● En 1995 la industria produktado de Ĉinio kreskis stabile. La industriaj entreprenoj de la ŝtata ĝis la subdistrikta niveloj plenumis aldonvaloron de 1 786.3 miliardoj da juanoj, je 13.4% pli multe ol tiu en 1994.

● Altkvalita ŝtalo por ŝipo, produktita de la Ferŝtala Kompanio de Anshan, la plej granda en nordorienta Ĉinio, jam ricevis licencon donitan de ŝipklasifikaj societoj respektive de Ĉinio, Usono, Norvegio, Britio kaj Germanio. Informiĝinte pri tio, iuj ĉinaj kaj alilandaj ŝipkonstruaj entreprenoj faris mendon ĉe la kompanio. Antaŭe Ĉinio ne kapablis produkti tian ŝtalon kaj devis importi ĝin el aliaj landoj.

● La unua ĉina senpilota helikoptero, produktita de la Pekina Aernaviga kaj Astronaŭtika Universitato, sukcese plenumis la unuan flugadon.

La senpilota helikoptero "Mevo", kun 80-ĉevalpova motoro, pezas 300 kg. La helikoptero havas du grupojn da rotoroj, supran kaj malsupran, sur komuna akso. Unu rotacias livume kaj la alia dekstrume. Sen empenerono ili produktas ekvilibrantan momenton. Laŭ raporto nur malmultaj landoj, kiaj Usono, Kanado, Britio kaj Germanio, povas produkti tian komunaksan helikopteron.



La senpilota helikoptero "Mevo"

● La Ĝenerala Administracio de Ĉina Civila Aviado investis pli ol 4 milionojn da usonaj dolaroj por importi 30 kompletojn da ekipaĵoj de aŭtomata trakta sistemo pri civilaviadaj informoj kaj starigis servoreton pri aviadaj informoj tra la lando. La reto kun la Ĝenerala Administracio de Ĉina Civila Aviado kiel la centro interŝanĝos kun 250 aerodromoj de 63 landoj kaj regionoj informojn pri aviadaj materialoj kaj datenoj por garantio de sekura flugado. Tio metis fundamenton por racie ekspluati aerajn riĉfontojn, krei aerpurajn kondiĉojn por aerodromoj kaj identigi kun la internacia aernaviga informo reto.

● En Ŝanhajo funkcias 20 superbazaroj, ĉiu kun areo de pli ol 1 000 kvadrataj metroj. La superbazaroj vendas ne nur ĉiutagajn necesajojn, lesivojn, kosmetikaĵojn, vitraĵojn, pakitajn manĝaĵojn, sed ankaŭ skribilojn, hejmajn elektrajn aparatojn, litaĵojn kaj 10 000 aliajn varojn.

SOCIO

● En januaro 1996 la "fikslabora sistemo", simbolo de la laborsistemo sub la planizita ekonomio, fariĝis pasintaĵo en Pekino. 2.08 milionoj da oficistoj kaj laboristoj en la urbo subskribis laborkontrakton kun sia entrepreno.

● En semajnfino kaj ferioj nemalmultaj lernejoj en Pekino senpage servas al la publiko per siaj sportejoj, sportaj instrumentoj kaj biblioteko, kaj tio estas laŭdata de la popolo.

KULTURO

● Eldoniĝis "Trezora Biblioteko", kompilita de la Ĉina Chengcheng-grupo kaj pli ol 2 000 fakuloj kaj erudiciuloj.

Ĝi enhavas pli ol 1 000 antikvajn librojn de ĉina kulturo, el pli ol 30 000 volumoj kun 250 milionoj da ideogramoj. Ĝi, entenanta Si Ku Quan Shu, daŭrigon de Si Ku Quan Shu kaj iujn gravajn verkojn, kiuj ne aperis en Si Ku Quan Shu, estas plej sistema kaj plena laboro de ordigo de antikvaj libroj de la pasintaj centoj da jaroj en Ĉinio. Ĝi aperis en transversa kompostado, kun simpligitaj ĉinaj ideogramoj kaj novtipa interpunkcio. Ĝia tipografio plenumiĝis tute per laserkomposta sistemo.

● Fama ĉina literaturisto kaj esperantisto Bakin, 96-jara, ricevas kuracadon en hospitalo, tamen li ne formetis sian plumon. Antaŭ nelonge li kontribuis al ĵurnalo per du novaj artikoloj kiel

postparoloj por la 4-a kaj 5-a volumoj de "Plena Kolekto de Tradukaĵoj de Bakin". En la artikoloj li konigis, kiel li tradukis la verkojn de Gorki, Herzen k.a., kaj diris sian opinion pri Tolstoj.

- Antaŭ sep jaroj fondiĝis eksponejo de vaporlokomotivoj en la urbo Datong, Ŝanxi(Ŝanŝji)-provinco, Ĉinio.

En la eksponejo estas lokomotivo fabrikita de Britio en 1909, lokomotivo fabrikita de Japanio en 1933 kaj la unua lokomotivo fabrikita de la nova Ĉinio por pasaĝera vagonaro. En la eksponejo tre okulfrapas la plej antikva ĉina lokomotivo, fabrikita en 1882.

SCIENCO KAJ TEKNIKO

- Prof. Wang Xuan (Ŭang Ŝjüan), prezidanto de la Ĉina Teknika Instituto de Komputero "Super", antaŭ nelonge ricevis sciencan premion de Unesko.

Prof. Wang Xuan gvidis esploradon kaj disvolvon de la ĉinlingva komputera komposta sistemo, kiu estigis teknikan revolucion de la gazetaro kaj eldonado de Ĉinio. Nun 99% de la ĵurnaloj kaj 90% de la libroj sur la ĉeftero de Ĉinio kaj plejparto de la ĉinlingvaj ĵurnaloj de Taiwan, Hongkong, Aomen, Malajzio kaj Norda Ameriko aplikas tiun kompostan sistemon.

- Ciferfaksa hibrida miniatura nervokomputero "Profeto n-ro 1", povanta fari 20 milionojn da operacioj sekunde, estis sukcese elfarita de la Transistora Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj. Ĝi povas fari operaciojn laŭ la cerba strukturo de homo kaj aliaj animaloj. Ĝi havas apartan superecon por solvi problemojn de pensado, kiaj desegno-rekonado, litero-rekonado kaj parolo-rekonado. Ĝia esplorado estas unu el la gravaj laboroj por pliintelektigi komputeron. La kerna peco de la komputero estas plur-elementa logika cirkvito kreita de Ĉinio, kaj ĝia kompleta strukturo kun aparta kreivo atingis la avangardan nivelon de la mondo.

- Nova marakvo-sensaliga ekipaĵo estas sukcese farita en la urbo Qingdao (Ĉingdaŭ), Shandong-provinco. La per ĝi sensaligita marakvo entenas tre malmulte da salo (0.2%), kaj la akvo estas trinkebla. La tekniko kun evidenta efiko pretigis vojon por plenigi mankon de sensala akvo.

MEDIPROTEKTO


- Ĉinio starigis naturparkon en la senhoma

regiono Kekexili de la Yushu-a Tibet-nacia Aŭtonoma Subprovinco de Qinghai.

Kekexili 5 000 m super la marnivelo havas originalan altmontan frostan naturmedion kaj altmontan frostan ekologion. Tie la estaĵoj plejparte estas propraj al la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo. Oni jam certigis, ke en la naturparko kun totala areo de 45 000 kvadrataj km vivas 248 specioj da mamuloj, birdoj kaj altklasaj vegetaloj.

ARKEOLOGIO

- Lastatempe geologoj de Hubei-provinco trovis kuriozajn fosiliojn, el kiuj la plej granda havas longon de 1.2 m kaj diametron de 12 cm, en Fangxian-gubernio, najbara al la naturparko Shennongjia (Ŝennongĝja). La fosilio kun larĝa kapo kaj maldika vosto havas formon de raketo. Post ekspertizo geologoj diris, ke la fosilio formiĝis el mara molusko antaŭ 450 milionoj da jaroj. Tio pruvis, ke Shennongjia kaj parto de Daba-montaro estis maro antaŭ la unua fendigo de la tero.



Fosilio en formo de raketo

TURISMO

- Lastatempe ekfunkciis la unua ĉina turisma mendo-reto starigita de la Ŝtata Scienc-Teknika Komisiono kaj Ŝtata Turisma Buroo de Ĉinio. Turistoj ĉinaj kaj alilandaj povas telefoni per (010)4928155 al la reto por fari konsulton aŭ mendon de hoteloj en la grandaj urboj de Ĉinio kaj pli ol 3 000 hoteloj en pli ol 40 landoj.

Suna fajrilo antaŭ 3 000 jaroj




S-ro Luo Xizhang en esplorado de la suna fajrilo

ANTAŬ unu jaro ĉinaj arkeologoj trovis en iu ne tre granda antikva tombo similaĵon de bronza spegulo. Pro sia ordinara aspekto ĝi ne vekis indan atenton. Sed poste, kiam la arkeologoj pli detale observis ĝin, ili asertis, ke ĝi estas nenio alia ol la suna fajrilo uzata de ĉinoj antaŭ 3 000 jaroj.


Fajro ludis ekstreme gravan rolon en la evoluado de la homa civilizacio. Transirante de konservado de natura fajro al arta farado de fajro, la homaro spertis kvalitan impeton. Kiel la prapatroj havigis al si fajron? Antikva ĉina legendo diras, ke la prauloj akiris fajron pere de frotado de ligno; kaj krome estas ankaŭ notoj en antikvaj libroj, ke oni akiris fajron de suna fajrilo. Sed antaŭ la ĉi-foja eltrovo oni nur legis en libroj, sed ne vidis la realan instrumenton "fajrilo". Sekve suna fajrilo restis enigmo dum longa tempo.

Estas tre interese, ke la trovo de la suna fajrilo estis tute hazarda. La 18-an de aprilo 1995 kamparano de Shaanxi (Ŝenŝji)-provinco rimarkis priŝtelitan tombon en Zhouyuan (Ĝouĵuan), kiu estas fama pro grandnombraj bronzaĵoj elfositaj el tombejo de la Okcidenta Zhou-dinastio (la 11-a jc. — 771 a.K.). Arkeologoj tuj hastis tien por prifosi. La ritaj ilaroj kaj fajencaĵoj estis jam ŝtelitaj, dum la fundo de la tombo estis prisemita per ĉevalaj kaj hundaj ostoj kaj duonglobetoj el bronzo kaj konko. Kiam la prifosantoj levis la oston

de la dekstra brako de la skeleto, ili vidis, ke sub la brako estas ronda jadplato kun duobla drako, jadaĵo en formo de tenilo kaj objekto simila al bronza spegulo.



La frontflanko de la suna fajrilo



La dorsflanko de la suna fajrilo

Tiu ronda similaĵo estas nenio alia ol la suna fajrilo, la plej frua instrumento de la ĉinaj prauloj por akiri fajron. Ĝi havas formon de kovrilo de taso kaj meze sur la dorsa flanko estas arka tenilo. Ĝi distingigas de bronza spegulo per polurita konkava surfaco. En la suno ĝi povas kondensi sunlumon kaj varmigi ĝis ekbruliĝo ion sur la fokuso. La surfaco surhavas multe da verdigraj makuloj, sed en la

mezo ankoraŭ troviĝas brila parto.

S-ro Luo Xizhang (Lŭo Ŝjigang), direktoro de la Muzeo de Zhouyuan, kiu gvidis la prifosadon kaj esploron de la antikvaĵoj, diris al mi, ke pro la ekstreme rareco de la aĵo, oni ne aŭdacis senverdigrigi kaj poluri ĝin, sed imitis similan konkavan spegulon. Oni poluris la reproduktaĵon kaj metis ĝin en la sunon, kaj ekbrulis vato kaj papero sur la fokuso. Sekve oni venis al la konkludo, ke tiu spegulo estas nenio alia ol la suna fajrilo.

Mezurado montris, ke la suna fajrilo havas diametron de 8.8 cm, dikecon de 0.19 cm kaj altecon de 1.8 cm, dum la tenilo altas 0.9 cm. La radiuso de kurbeco de la fajrilo estas 19.8-20 cm. Fakuloj opinias, ke la rezulto de mezurado post forigo de la verdigro estos pli ekzakta. Estas admirinde, ke antaŭ 3 000 jaroj prauloj de la ĉinoj jam elfaris tiel ekzaktan globan surfacon, ĉar la moderna ricev-anteno de radaro kaj televido kaj medicina endoskopo estis faritaj laŭ la sama principo.

Kiu estis la mastro de la tombo, kaj kial tiu povis havi tian objekteton en sia tombo? Juĝante laŭ la skalo de la tombo kaj la antikvaĵoj en ĝi, la arkeologoj preferis dati la tombon je pli frua tempo ol la meza periodo de la Okcidenta Zhou-dinastio. Krome ili hipotezis laŭ la notoj en antikvaj libroj pri fajrokonservado, ke la mastro de la tombo estis ŝtatoficisto zorganta pri la suna fajrilo. ■



Membroj de la Klasika Orkestro de Nara en kostumoj de kortegaj muzikistoj de Tang-dinastio

LUO SHIMIN:

Antikva ĉina muzikaĵo retrovita en Japanio

TIU estas kelkminuta antikva muzikaĵo, sed ĝi estas atesto pri la kultura interŝanĝo inter Ĉinio kaj Japanio antaŭ 1 300 jaroj. La muzikaĵo sub la titolo “Batalo de Princo Lanling” estis dediĉita al la ĉefgeneralo Gao Su en la posta periodo de la Norda Qi-dinastio (550-577). Pro sia granda merito li estis nomumita Princo Lanling. Laŭ notoj en historiaj libroj li estis bela kaj brava. Sed li opiniis, ke afabla vizaĝo ne povas timigi malamikojn, sekve li lasis fari por li kaj liaj soldatoj terurajn maskojn. Kaj fakte la maskoj vere teruris la malamikojn, ke ĉi tiuj diskuregis en timego kriegante: “Venas ĉielaj trupoj...”

Por prikanti lian heroecon kaj kuraĝigi la soldatojn, nacimalplimultaj muzikistoj en la armeo de Princo Lanling verkis la muzikaĵon kaj dancon “Batalo de Princo Lanling” kaj ludis ĝin en celebrado de venko kaj en paŭzo inter bataloj.

Ĝi estis soldanco akompanata de dekoj da muzikoludantoj. La dancanto devis porti maskon kaj imiti la batalon de Princo Lanling. Libroj pri muzika historio notas, ke la dancanto devis porti purpuran robon, oran zonon kaj vipon.

La muziko de la danco “Batalo de Princo Lanling” estis tre populara en la popolo, kaj en Sui-

dinastio (581-618) ĝi estis ludata en la kortego. Ĉefgeneralo Li Shimin en la posta periodo de Sui-dinastio tre ŝatis tiun muzikaĵon kaj ege adoris la belan generalon batalantan sub masko. Kiam li farigis imperiestro de Tang-dinastio (618-907), li imite komponis muzikaĵon “Venka Batalo de Princo de Qin-regno”. Konforme al la ŝato de Li Shimin, oni ofte ludis “Batalon de Princo Lanling” ĉu en la kortego ĉu inter la popolo. Sed post la morto de la imperiestro, por esprimi respekton al li, la kortego malpermesis la ludon de “Batalo de Princo Lanling”. Pro tio silentiĝis kaj poste malaperis la muzikaĵo furorinta.

Sed neniu atendis, ke en la mezo de la 50-aj jaroj de la kurranta jarcento Mei Lanfang, ĉina pekin-opera majstro, rimarkis en Japanio la muzikaĵon “Batalo de Princo Lanling”, kiam li faris prezentadon tie. Lia trovo vekis atenton de la ĉina dramista rondo. Poste Li Shaochun, eminenta aktoro de pekina opero, speciale lernis tiun dancon dum sia turneo en Japanio. Li diris: “Multaj gestoj kaj movoj en ‘Batalo de Princo Lanling’ estas similaj al kaj samsignifaj kun tiuj en pekina opero, ekzemple la svingo de ordona flago en ‘Batalo de Princo Lanling’ havas saman signifon kun tiu en pekina opero. Tion sekvas la movoj signifantaj sturmon. Dank’ al la simileco mi povis pli facile eller-

ni la dancon.” Tiutempe la japana instruisto ankoraŭ ne povis ekspliki kelke da gestoj. Li prenis tiun ĉinan artiston kiel sian intimulon rilate ‘Batalon de Princo Lanling’. Li donacis senekzemple al Li Shaochun tre valorajn kostumojn por ludo de “Batalo de Princo Lanling”. Post reveno al la hejmlando Li Shaochun multfoje prezentis “Batalon de Princo Lanling” al siaj kolegoj kaj kune kun ili esploris la originon de tiu antikva danco.

En 1986, helpate de japanaj kolegoj, s-ro Ma Zhongli (Ma Ĝongli), aŭtoritata historiisto pri la Nordaj Dinastioj de Ĉinio, esploris “Batalon de Princo Lanling” 4


Prof. Kasagi Kaniĉi prezentas antaŭ la tombo de princo Lanling



Nova libro eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo

Bakin kaj Esperanto

(en la ĉina lingvo)



S-ro Bakin estas fama ĉina verkisto kaj tradukisto, kaj ankaŭ veterana esperantisto. Jam en sia juneco li komencis lerni Esperanton, redaktis Esperantajn periodaĵojn kaj fervore subtenis la Esperantan movadon. Li elesperantigis multajn verkojn de aliaj nacioj.

Tiu ĉi libro konsistas el tri partoj: verkaĵoj, tradukaĵoj kaj leteroj. Al la libro estas aldonitaj kronologiaj notoj pri aktivado de Bakin, kiuj estas valoraj por koni la rilatojn inter Bakin kaj Esperanto.

Formato: 14 X 22 cm. (broŝ.) 436 pĝ.

Prezo: 10.00 USD

Mendu ĉe Distribua Fako de EPĈ
Libroservo de UEA
EPĈ-peranto en via lando

monatojn. Poste fakuloj de ambaŭ landoj venis al la sama konkludo, ke "Batalo de Princo Lanling" naskiĝis en Ĉinio kaj venis en Japanion kune kun budhismo en Tang-dinastio.

Antaŭ 40 jaroj profesoro Kasagi Kaniĉi de Nara-universitato de Japanio jam komencis ludi la rolon de Princo Lanling. Ĉiufoje li ludis kun granda seriozeco kaj patoso, ĉar la rolo estas brava eminentulo de milito. La figuro de la heroo vivis en Japanio jam pli ol 1 300 jarojn. Ĝi prezentiĝas en gravaj festoj de Japanio, ekzemple ĉevalvetkura festo kaj *sumo*-lukto. Kaj ĝis nun la Klasika Arta Tago de la Printempa Festivalo de Nara enlistigas "Batalon de Princo Lanling" kiel la unuan programeron.

En la komenco de la 90-aj jaroj,

ĝuste ĉe la 20-a datreveno de la normaligo de la diplomaciaj rilatoj inter Ĉinio kaj Japanio, s-ro Kasagi Kaniĉi kaj la Klasika Orkestro de Nara venis al Ĉinio kunportante "Batalon de Princo Lanling". Ili prezentis la dancon antaŭ antikva tombo en Cixian (Ciŝjan)-gubernio de la urbo Handan. Ili multe ekscitiĝis pro sia prezentado, ĉar en tiu tombo ripozas Princo Lanling.

La ĉinaj spektantoj kun granda ĝojo rimarkis, ke la 32 muzikistoj surhavas vestojn kun karakterizaĵoj de Tang-dinastio. La muzikiloj estas tute samaj kiel la antikvaj tamburetoj, flutoj kaj aliaj muzikiloj de Ĉinio. Kaj la muziko ludata per tiuj instrumentoj havas kaj la guston de antikva japana muziko kaj tiun de Tang-dinastio. ■

GALERIO

Jada drako

de RUAN HAIYING

La kurioza drako el polurita verda serpenteno, 26 cm alta, aspektas fluganta. La artisto donis apartan atenton ne al ĉizado de ĝiaj detalaĵoj, sed al ĝia totema efiko. La drako en formo de C etendas sian buŝon antaŭen. Neniu desegno vidiĝas sur ĝia glata korpo. Nur sur ĝia frunto kaj ĉe ĝia malsupra makzelo estas tre delikataj strekoj. Tiu simpla traktado pliiĝis la belecon kaj imponecon de la fluganta drako. La ornamaĵo, farita en la neolitika epoko, estas tre valora artaĵo postlasita de niaj prapatroj.





Printempo
de Nikola Peev
(Bulgario)



Aŭtuno
de Nikola Peev
(Bulgario)

ISSN 0032-4361



世界语 《中国报道》 一九九六年第五期
(本刊代号:二——九一五) 国内统一刊号:CN11 1339/G2